# Deka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

## Enkonduko

La Akademio de Esperanto prezentas en tiu ĉi Deka Oficiala Aldono 420 radikojn kaj 832 vortojn aŭ plurvortajn terminojn, kiujn ĝi decidis aldoni al la Universala Vortaro, t.e. oficialigi. Post tiu aldono, la Akademia Vortaro tiel konsistos el la origina Universala Vortaro kaj dek Oficialaj Aldonoj.

La unua renkonto inter esperantistoj tre ofte komenciĝas per interŝanĝo de informoj pri la lokoj, kie ili kaj iliaj familianoj loĝas aŭ naskiĝis, pri ilia genta aŭ landana aparteno, kaj pri la lingvoj, kiujn ili lernis denaske aŭ nun scipovas paroli. Surbaze de tiu realo povas ŝajni surpriza la fakto, ke la Universala Vortaro enhavas relative malmulte da propraj nomoj pri geografio, kaj ke ĝia paletro de nomoj por gentoj kaj lingvoj estas ankoraŭ modesta kompare kun la vasta kanvaso, sur kiu evoluas la nuntempa lingvouzo. La jena Oficiala Aldono volas ŝanĝi tiun situacion kaj fiksi la formon de multaj tiaj vortoj surbaze de raciaj principoj kaj de uzo konstatebla ĉe bonaj aŭtoroj.

Sed la intereso de tiu ĉi dokumento kompreneble ne limiĝas al la faciligo de sinprezentaj konversacioj. Sur la geografia tereno ĝi starigas detalan mapon de la aktuala mondo kaj evidentigas gravajn rilatojn inter gentoj, landoj kaj lingvoj. Ĝi ebligos paroli pri la ĉefaj montoj, maroj, riveroj, insuloj kaj lagoj per nomoj ekde nun oficialigitaj. Ĝi ankaŭ atestas la rilaton inter lingvoj kaj lingvofamilioj, la historian evoluon de landoj nuntempaj kaj antikvaj, kaj skizas la administran dividon de multaj landoj en regionojn aŭ alinomajn landerojn. Kaj preter la aro da elementoj, kiujn oficialigas la Aldono, ĝi volas montri per ekzemploj la ĝeneralajn principojn aplikindajn ĉe ĝusta esperantigo de pliaj samspecaj vortoj.

Nomoj de gentoj aŭ landanoj (vidu la postan atentigon pri la rilato inter tiuj du konceptoj) kiel *anglo*, *franco*, *germano*, *hispano* kaj *ruso* jam estas Fundamentaj, kaj el tiuj eblas formi la landnomojn *Anglujo*, *Francujo*, *Germanujo*, *Hispanujo* kaj *Rusujo*. Same Fundamentaj estas la kontinentonomo *Eŭropo* kaj la urbonomoj *Berlino*, *Bulonjo*, *Londono*, *Nov-Jorko* kaj *Parizo*, kiel detalite en la parto B de la 1-a Listo de la Sepa Oficiala Aldono. La Oka Oficiala Aldono el la jaro 1974 plie oficialigis 32 landnomojn kaj 15 landanonomojn (tamen sen difinotekstoj) kaj krome la nomojn de kvar kontinentoj, unu maro kaj du oceanoj (kun difinotekstoj kaj tradukoj en ses naciajn lingvojn). La Naŭa Oficiala Aldono el la jaro 2007 poste oficialigis la nomojn de la du polusaj regionoj kaj du pliajn landnomojn.

La Akademio de Esperanto aperigis en la jaro 1989 dokumenton kun la nomo “Listo de Normaj Landnomoj” (*Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 9*), kiun ĝi anstataŭigis en la jaro 2009 per ĝisdatigita kaj reviziita “Listo de Rekomendataj Landnomoj” (*Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 11 – 2009 04 15*). Tiu lasta dokumento enhavas nomojn por ĉiuj 192 tiam ekzistantaj membroŝtatoj de la Unuiĝintaj Nacioj. La Deka Oficiala Aldono nun oficialigas ĉiujn el tiuj landnomoj, kiuj ankoraŭ ne estis oficialigitaj, kaj aldone la nomon de 193-a membroŝtato (Sud-Sudano), kiu sendependiĝis en la jaro 2011. La Akademio faras tiun elpaŝon konstatinte, ke la antaŭaj Akademiaj Rekomendoj kontribuis al firmigo kaj unuecigo de la lingvouzo, kaj ke la tempo nun estas matura por plena oficialigo.

Per la Deka Oficiala Aldono la Akademio oficialigas ankaŭ la nomon de la plejparto de urboj, kie iam okazis Universala Kongreso. Ĝi faras tion konstatinte, ke tiuj urbonomoj firme enradikiĝis en la reala lingvouzo, kaj agnoskinte, ke la Esperanta geografio kelkfoje posedas trajtojn, kiuj distingas ĝin disde la kutima tutmonda geografio.

Estas menciinde, ke la Deka Oficiala Aldono sekvas la modelon de la Naŭa Oficiala Aldono, en kiu ĉiuj difinoj estas verkitaj nur en Esperanto, sen tradukoj en naciajn lingvojn. Ĝi nur escepte provizas difinojn por elementoj jam antaŭe oficialigitaj. La Akademio konsideras la eblon estonte aldoni difinojn ankaŭ al la geografiaj nomoj entenataj en la Fundamento kaj en antaŭaj Oficialaj Aldonoj, laŭ la kriterioj de la jena dokumento. Estas notinde ankaŭ, ke la Deka Oficiala Aldono je la unua fojo oficialigas kelkajn plurvortajn kombinaĵojn (kiel la *Ruĝa Maro* kaj la *Roma Regno*), kiuj havas valoron de propra nomo.

La Direktoro volas aparte danki al la membroj de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, kiuj per sindona laboro kaj konstruaj komentoj senlace kontribuis al plibonigo de la dokumento.

La Deka Oficiala Aldono estis aprobita de la Akademio la 24-an de Septembro 2023. Voĉdonis 41 el 45 Akademianoj (pli ol du trionoj). La limo de aprobo estis do 21 jesaj voĉdonoj (duono el ĉiuj voĉdonintoj). La dokumento ricevis 32 jesajn, 4 neajn kaj 5 sindetenajn voĉojn. Sekve estas oficialigitaj ĉiuj 420 radikoj kaj 832 vortoj aŭ plurvortaj terminoj kun siaj respektivaj difinotekstoj.

La Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro,

Jesper Lykke Jacobsen

## Atentigo pri uzado de popolnomoj

Pli-malpli ĉiuj popolnomoj apartenas al unu el la du kategorioj: gentobazaj popolnomoj kaj landobazaj popolnomoj.

La nocio “gento” estas malfacile difinebla de scienca vidpunkto. Eĉ se oni alprenas la vastan difinon de “homgrupo kun difinitaj historiaj kaj kulturaj tradicioj”, estas malfacile difini, laŭ kiuj objektivaj kriterioj iu homo apartenu aŭ ne apartenu al tiu grupo. Kaj estas malfacile pravigi, kial por iuj el tiaj homgrupoj ekzistas en Esperanto aparta nomo por montri al ties anoj, kaj por aliaj ne.

En tiu ĉi dokumento, ni uzas la vorton “gento” en vasta senco, agnoskante ke laŭ iuj preferoj kaj en certaj kuntekstoj oni povas distingi tiun vorton de la rilata termino “etno”. Same, la nocioj “popolo” kaj “nacio” havas signifojn apudajn al tiuj de la ĵus menciitaj terminoj. Por nuntempe ekzistanta, politike sendependa kaj internacie rekonata teritorio ni plejofte uzas la vorton “lando”, kvankam en iuj situacioj oni povas paroli pri “regno”, “ŝtato”, “princlando” aŭ alio.

### Gentobazaj popolnomoj

En la historio de lingvoj antaŭ Esperanto multaj popolnomoj aperis antaŭ la rilataj nomoj de landoj nun ekzistantaj, kaj iĝis nomdona elemento por formiĝantaj landoj. Ofte oni nomas tian nomdonan genton la “ĉefgento” de la lando nomita laŭe. Esperanto enprenis multajn landnomojn laŭ tiu skemo (Skotlando, Grekujo, Egiptujo, Japanujo), kaj ankaŭ la rilata vorto “ĉefgento” troviĝas en antaŭaj Akademiaj decidoj, kiel la Naŭa Oficiala Aldono. La termino “ĉefgento” cetere estas pure konvencia kaj tute aparte permesas konkludi, nek ke tiu gento nun konsistigas (aŭ eĉ iam konsistigis) la plimulton de la loĝantaro de la koncerna lando, nek ke ties (realaj aŭ supozitaj) trajtoj senŝanĝe konserviĝis tra la historia evoluo.

Notindas, ke la nomoj de kelkaj, eĉ tre antikvaj, gentoj ne donis nomon al regno, aŭ tia regno ekzistis, sed en iu historia periodo malaperis aŭ dividiĝis en kelkajn regnojn (hebreoj kaj filiŝtoj de antikveco; frankoj; gaŭloj; poloj en la periodo, kiam Pollando ne ekzistis kiel aparta ŝtato; prusoj post la malapero de Prusujo; jugoslavoj ktp).

Se la popolnomo estas gentobaza, tiam ĝi ofte konserviĝas tra la ŝanĝiĝoj en la konsisto de la popolo kaj refasonado de la mondmapo, dum la koncerna lando povas esti tute alia ol origine. Por tiaj popolnomoj la lingvaj rimedoj de Esperanto permesas distingi apartenon al la nomdona popolo de la lando disde landaneco. Ekzemplo de tia rigora, gentobaza uzo troviĝas jam en la Ekzercaro:

> *Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj.*

Tia distingado povas esti aparte utila en esence multgentaj landoj, kie aparteno al gento (aŭ eĉ al la ĉefgento de la lando) estas ofte konsiderata afero alia ol landaneco.

### Landobazaj popolnomoj

Male, multaj popoloj nomiĝas laŭ la lando, kie ili loĝas, tiel, ke la landnomo servas por derivi la nomon de la landanoj. Ankaŭ pri tiu skemo troviĝas abundaj ekzemploj en la ĝenerala lingvohistorio antaŭ Esperanto. Specife en tiu ĉi lasta, tiu nomdona kutimo ekzistas ne nur en la “Nova Mondo”, kie formiĝis la “novaj” nacioj de usonanoj, kanadanoj, aŭstralianoj, brazilanoj, meksikanoj kaj multaj aliaj, sed ankaŭ en la “Malnova Mondo” ekzistas (aŭ ekzistis) tiaj nacioj (nederlandanoj, venecianoj, irlandanoj, libianoj, marokanoj).

La signifo de la popolnomo kutime evoluas konforme kun la ŝanĝiĝo de la teritoria konsisto de la koncerna lando.

### Landana uzo de gentobazaj popolnomoj

En kelkaj landoj la nomo de la ĉefgento estas ankaŭ uzata iom elaste por signifi simple loĝanton de la koncerna lando. Tia uzo estas ofta en landoj tradicie malmultgentaj, aŭ kiam ekzistas tradicio kaj atendo, ke malplimultaj gentoj aŭ enmigre alvenintoj rapide asimiliĝas al la ĉefgento.

Alia motivo por elasta landana uzo ekzistas en oficialaj aŭ statistikaj rilatoj, en kiuj oni emas konsideri, ke ĉiu, kiu posedas ekzemple germanan naciecon kaj pasporton, estas efektiva germano, sendepende de gentaj konsideroj. Same, iuj nomas sin mem per tia landana uzo por montri sian asimiliĝon al la ĉefgento, laŭ memidentiĝo.

La landana uzo de gentobaza popolnomo povas sin trudi ankaŭ al okazoj, kie tradicie valoras la rigore gentana uzo, aparte kiam temas pri deekstera rigardo al la koncerna lando. Tiu fenomeno montras, ke ne nur rolas la lokaj validaj faktoroj, sed ankaŭ la limigita kono, kiun eksterulo havas aŭ povas havi pri ili.

### Kion signifas tiaj diferencoj?

El socia vidpunkto la diferenco inter gentobazaj kaj landobazaj popolnomoj ŝajnas sensignifa. Tiel oni apenaŭ povas tiri iajn socipolitikajn diferencojn el tio, ke la popolnomo "belgoj" estas gentobaza, dum la nomo de najbara nacio "nederlandanoj" estas derivita el la nomo de ilia lando. Ŝajnas do, ke tia distingo estas nur historia kaprico.

Pri tiu vidpunkto jam atestas la antaŭa Akademia decido "Rekomendoj pri Landnomoj" el 1985, kies 3-a punkto tekstas:

> *La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, Angl-ujo / -io — Angl-oj kaj en la alia kategorio Nederland-o — Nederland-anoj*.

Tamen, en kelkaj landoj oni nete distingas apartenon al la ĉefgento kaj landanecon. Ekzemple, nomi ajnan rusujanon "ruso" povas soni al tieaj landanoj kiel speco de ŝovinismo aŭ minimume nekompreno de bazaj sociaj distingoj.

En aliaj landoj oni kutime ne faras tian distingadon. Tiel, la formo "italujano" apenaŭ renkonteblas. Tute analoge, la formo "nederlandano" kutime funkcias kiel gentana aŭ naciana nomo, ne nur kiel nomo de landano.

Fine, en iuj aliaj landoj la uzado estas transira inter tiuj du polusaj modeloj kaj, krome, la uzado povas varii depende de la historia periodo, politika klimato kaj eĉ socia grupo kaj antaŭvideble plu evoluos.

### Kiel tio reflektiĝas en la nuna decido de la Akademio?

Ni atendas, ke la decidoj de la Akademio estos validaj dum longa tempo kaj nur minimume dependos de la politikaj kaj sociaj ŝanĝoj en la mondo. Tial ni ne penas pedante priskribi precizajn nuancojn de la hodiaŭa uzado de ĉiu aparta popolnomo. Tiaj detaloj kaj nuancoj ne aperu sur la nivelo de difinoj en la Akademia Vortaro.

**Tial ni difinas** ĝenerale la koncernajn gentonomojn elaste, kun du konvenciaj signifoj: **1** Ano de la ĉefgento de X-ujo (aŭ simila vortumo, eventuale kun kelkaj aldonaj informoj), kaj **2** Ano de X-ujo, **subkomprenante ke** depende de la specifa termino, la kunteksto kaj de la parolanto povas validi pli rigora vidpunkto, tiel ke unu el la du signifoj estas pli verŝajna ol la alia.

Tia flekseblo kaj variado estas parto de normala funkciado de Esperanto. Kiel validas preskaŭ pri ĉio en lingvo, por klare esprimi sian penson kaj por esti ĝuste komprenita, oni devas apliki atendeblajn eksterlingvajn sciojn kaj lingvo-sociajn normojn de la koncerna medio kaj epoko.

## Rekomendo pri la elekto inter *land* kaj *uj*

En kelkaj gentobazaj nomoj oni uzas la radikon *land* anstataŭ *uj*, pro internacieco aŭ Esperanta tradicio:

> poloj → Pollando (la lando de la poloj)
>
> svisoj → Svislando (la lando de la svisoj)

Sed kompreneble oni povas ankaŭ en tiaj okazoj uzi *uj*: Polujo, Svisujo. En la ĉi-postaj difinotekstoj, la Akademio prezentas kelkajn gentobazajn nomojn kun *land* anstataŭ *uj*, ĉar la formoj kun *land* estas pli kutimaj por tiuj nomoj. Sed la Akademio neniel kontraŭas la respondajn formojn kun *uj*. Inverse ankaŭ eblas ĉe tiuj landoj, por kiuj la Akademio prezentas formon kun *uj*, anstataŭe uzi formojn kun *land* (Danlando, Anglolando k.s.). Sed ĝenerale estas preferinde uzi *land* tiamaniere nur tiam, kiam la rezulta formo havas Esperantan tradicion.

## Pri *-ujo* kaj *-io*

En la Oka Oficiala Aldono (1974) la Akademio esprimis sin pri la uzo de "la sufikso *-io*" apud la Fundamenta *-ujo* por formi gentobazan landnomon, "nuligante la antaŭan malkonsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo". En la "Listo de Rekomendataj Landnomoj" (2009) la

Akademio sisteme prezentis formojn kun la finaĵo *-io* post la respondaj formoj kun la finaĵo *-ujo*, sed piednote rememorigis pri la neoficiala statuso de *-io*.

En la jena Deka Oficiala Aldono la Akademio volas nenion ŝanĝi aŭ aldoni al siaj antaŭaj decidoj pri *-io*. Konstateblas nur, ke la Akademio ĝin ne oficialigis kaj ankaŭ nun ne oficialigas ĝin. Tial la nunaj difinotekstoj uzas la Fundamentan finaĵon *-ujo*. La respondaj formoj kun *-io* restas neoficialaj.

## Rekomendoj pri nomoj de landoj kaj iliaj subdividoj

En 1985 la Akademio oficialigis la jenajn Rekomendojn pri Landnomoj, ree konfirmitan en la enkonduko al la Listo de Rekomendataj Landnomoj de 2009:

> 1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaros, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.
>
> 2. En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ ankaŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.
>
> 3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, Angl-ujo / -io - Angl-oj kaj en la alia kategorio Nederland-o - Nederland-anoj.
>
> 4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia “sufikso” aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i)stano,...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

Ni konsideras ĉi tiujn rekomendojn aplikindaj ne nur al la nomoj de sendependaj landoj, sed ankaŭ al iliaj subdividoj (ŝtatoj, provincoj, federaciaj landoj, dependaj teritorioj, kantonoj, regionoj, respublikoj, gubernioj ktp).

La kvara listero klarigas, kial ni oficialigis formojn kiel “Luksemburgo” (por sendependa lando), “Nov-Jorko” kaj “Kolorado” (por usonaj ŝtatoj) kaj ne la foje uzatajn konkurencajn formojn “Luksemburgio”, “Nov-Jorkio” kaj “Koloradio”. La unua listero klarigas, kial ni oficialigis “Kebekio” por kanada provinco malgraŭ la malkohero de ĉi tiu formo kun la kvara principo: Ni konstatis, ke en la efektiva lingvouzo la uzado de “Kebekio” estas tiom unueca, ke ĉi-okaze la unua listero havas prioritaton super la kvara listero.

## Uzado de dividostrekoj

En ĉi tiu dokumento ni uzas dividostrekon en iuj kunmetitaj geografiaj nomoj, ekz. “Sud-Afriko” kaj “Nov-Gvineo”. Oni povus same bone skribi “Sudafriko” k.s., sed la uzo de dividostreko estas kutima kaj substrekas la kunmetitecon. Ni tamen uzas dividostrekon nur inter Esperantaj lingvoelementoj, neniam ene de Esperanta lingvoelemento, sekvante la jam okazintan decidon de la Oka Oficiala Aldono koncerne la nomon “Kostariko”. Tial, ekzemple, ni oficialigas la formojn “Riodeĵanejro” kaj “Telavivo”, ne “Rio-de-Ĵanejro” kaj “Tel-Avivo”, kvankam tiuj lastaj skribmanieroj kun dividostreko estas oftaj. Ili restu konsiderataj neplene esperantigitaj same kiel aliaj tiaj formoj, eventuale uzeblaj por atingi pli facilan rekoneblon. Kiel ajn oni skribas la nomojn de tiuj du urboj, iliaj esperantaj radikoj ĉiuokaze estas “riodeĵanejr/” kaj “telaviv/”.

## Uzo de internaciaj kodaĵoj

Nia dokumento uzas la internacian normon ISO 3166-2 por provizi kodaĵojn por landoj kaj landeroj. La landera subdivido estas rekonebla pro la apero de dividostreko. La nomo de subdivido (ŝtato, provinco, federacia lando, dependa teritorio, kantono, regiono, respubliko, gubernio ktp) varias laŭ la koncerna lando. Aldone ni montras naciajn landerokodaĵojn por kvar respublikoj en la Rusuja Federacio, laŭ la normo ГОСТ Р 50577-2018. Por lingvoj ni uzas la internacian normon ISO 639-3.

**Acor/o/j.** Insularo de Portugalujo, en Atlantiko. Internacia landerokodaĵo: PT-20.

**Adelajd/o.** La ĉefurbo de la aŭstralia ŝtato Sud-Aŭstralio.

**Aden/o.** Havenurbo en la sudokcidenta parto de Jemeno, ĉe la Adena Golfo.

**Adriatik/o.** Maro inter la Balkana kaj Itala Duoninsuloj.

**afgan/o.** Ano de Afganujo. **Afgan/uj/o.** Lando en meza Azio, inter Irano kaj Ĉinujo. Internacia landokodaĵo: AF. **afgan/a.** Rilata al afganoj aŭ Afganujo.

**Afrik/o** (8OA). **Centr-Afrik/o.** Lando en meza Afriko, norde de Demokratia Respubliko Kongo kaj sude de Ĉado *2*. Internacia landokodaĵo: CF. **Okcident-Afrik/o.** Regiono de Afriko nuntempe plej ofte difinata kiel konsistanta el la landoj Maŭritanio, Malio, Niĝero, Niĝerio, ĉiuj landoj inter tiuj kvar kaj Atlantiko, kaj la apudaj insuloj. **Sud-Afrik/o.** La plej suda lando de Afriko. Internacia landokodaĵo: ZA.

**Akad/o.** Antikva urbo en Mezopotamio, la ĉefurbo de la Akada Imperio. **akad/an/o.** Ano de la antikva ĉefgento de la Akada Imperio, parolanta ŝemidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: akk). **akad/a.** Rilata al Akado, akadanoj, la akada lingvo aŭ la Akada Imperio.

**Alask/o.** Usona ŝtato, en la nordokcidenta parto de Nord-Ameriko. Internacia landerokodaĵo: US-AK.

**Aleksandri/o 1** Antikva urbo en Egiptujo, ĉe la bordo de Mediteraneo, fondita de Aleksandro la Granda. **2** Gubernio de Egiptujo, kies ĉefurbo estas Aleksandrio *1*. Internacia landerokodaĵo: EG-ALX.

**Alp/o/j 1** La plej granda eŭropa montaro, kiu etendiĝas de Mediteraneo ĝis Aŭstrujo. **2** (kun preciziga nomepiteto) Kelkaj aliaj montaroj aŭ partoj de Alpoj *1*: *Italaj Alpoj*; *Japanaj Alpoj*; *Aŭstraliaj Alpoj*; *Lunaj Alpoj*. **Alt/a/j Alp/o/j.** Departemento en Francujo, apud la itala landlimo, sudokcidente de Torino. Internacia landerokodaĵo: FR-05. **Mar/bord/a/j Alp/o/j.** Departemento en Francujo, ĉe Mediteraneo, apud la itala landlimo. Internacia landerokodaĵo: FR-06.

**Alzac/o.** Regiono kun speciala statuso de Francujo, situanta inter Vogezoj *1* kaj Rejno, konsistanta el la departementoj Supra Rejno kaj Malsupra Rejno. Internacia landerokodaĵo: FR-6AE. **alzac/an/o.** Ano de Alzaco. **alzac/a.** Rilata al alzacanoj, Alzaco aŭ la ĝermana lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: gsw): *alzaca vino*.

**Amazon/o 1** Rivero en Sud-Ameriko, kiu fluas de Andoj tra Peruo kaj Kolombio ĝis Brazilo, kie ĝi enfluas Atlantikon apud la ekvatoro. **2** Brazila ŝtato, en kiu situas granda parto de la amazona pluvarbaro. Internacia landerokodaĵo: BR-AM. **3** Departemento en Kolombio, en ties suda parto. Internacia landerokodaĵo: CO-AMA. **4** Regiono de Peruo, en ties noda parto. Internacia landerokodaĵo: PE-AMA. **5** Venezuela ŝtato, en la suda parto de Venezuelo. Internacia landerokodaĵo: VE-Z.

**Amerik/o** (8OA). **Centr-Amerik/o.** Regiono de Ameriko konsistanta el la landoj Gvatemalo, Belizo, Salvadoro, Honduro, Nikaragvo, Kostariko kaj Panamo. **Nord-Amerik/o.** Regiono de Ameriko nuntempe plej ofte difinata kiel konsistanta el la insulo Gronlando kaj la landoj Kanado, Usono kaj Meksiko; iafoje ankaŭ Centr-Ameriko kaj la insuloj en kaj apud la Kariba Maro estas enkalkulataj. **Sud-Amerik/o.** La suda parto de Ameriko, kiun ĉirkaŭas Pacifiko, Atlantiko, la Kariba Maro kaj la orienta limo de Panamo.

**Amsterdam/o.** La ĉefurbo de Nederlando, situanta en Nord-Holando.

**And/o/j.** La plej longa montoĉeno en Sud-Ameriko, apartiganta Ĉilion disde Argentino kaj Bolivio kaj etendiĝanta pli norde tra Peruo kaj Ekvadoro, ĝis Kolombio.

**Andor/o.** Lando en Pireneoj, inter Hispanujo kaj Francujo. Internacia landokodaĵo: AD.

**Angol/o.** Lando en sudokcidenta Afriko, inter Demokratia Respubliko Kongo kaj Namibio. Internacia landokodaĵo: AO.

**Antigv/o.** La ĉefa insulo de Antigvo kaj Barbudo. **Antigv/o kaj Barbud/o.** Insulara lando en la norda parto de Malgrandaj Antiloj, konsistanta precipe el Antigvo kaj la pli malgranda insulo Barbudo. Internacia landokodaĵo: AG.

**Antil/o/j.** Insularo inter la Kariba Maro kaj Atlantiko, konsistanta el Grandaj Antiloj kaj Malgrandaj Antiloj. **Grand/a/j Antil/o/j.** La kvar plej grandaj insuloj en Antiloj (i.a. Kubo kaj Jamajko) kaj la Kajmana Insularo, situantaj en la norda parto de la Kariba Maro. **Mal/grand/a/j Antil/o/j.** Ĉeno de pli malgrandaj insuloj, en la orienta kaj sudorienta partoj de la Kariba Maro, etendiĝanta de Grandaj Antiloj ĝis Venezuelo kaj laŭlonge de ties bordo.

**Antverpen/o 1** Havenurbo en Flandrujo. **2** Provinco de Belgujo, kies ĉefurbo estas Antverpeno *1*. Internacia landerokodaĵo: BE-VAN.

**Apolon/o.** Dio de lumo, poezio kaj artoj, filo de Zeŭso, laŭ la antikvaj greka kaj roma mitologioj.

**arb/o** (FdE). **Nigr/a Arb/ar/o.** Granda arbarkovrita montaro en sudokcidenta Germanujo, oriente de Rejno, proksima al la limoj kun Francujo kaj Svislando.

**Argentin/o.** Lando en Sud-Ameriko, inter Andoj kaj Atlantiko. Internacia landokodaĵo: AR.

**Asiri/o.** Antikva regno en la norda parto de Mezopotamio, nun parto de Turkujo, Sirio, Irako kaj Irano. **asiri/an/o.** Ano de la antikva ĉefgento de Asirio. **asiri/a.** Rilata al asirianoj, Asirio aŭ la vario de la akada lingvo tie parolata.

**Aten/o 1** La ĉefurbo de Grekujo. **2** Urboŝtato en la antikva Grekujo.

**Aŭgsburg/o.** Urbo en Germanujo, situanta en Bavarujo, nordokcidente de Munkeno.

**aŭstr/o 1** Ano de la ĉefgento de Aŭstrujo, parolanta la germanan lingvon. **2** Ano de Aŭstrujo. **Aŭstr/uj/o.** Federacia regno en la suda parto de Mez-Eŭropo, ĉe la orienta parto de Alpoj. Internacia landokodaĵo: AT. **aŭstr/a.** Rilata al aŭstroj aŭ Aŭstrujo. **Aŭstr/a Imperi/o.** Inter la jaroj 1804 kaj 1867, imperio konsistanta el Aŭstrujo kaj aliaj landoj sub ties superrego. **Aŭstr/uj/o-Hungar/uj/o.** Inter la jaroj 1867 kaj 1918, imperio formita per kunigo de la Aŭstra Imperio kaj parto de la Hungara Regno. **Mal/supr/a Aŭstr/uj/o.** Aŭstra federacia lando, en la nordorienta parto de Aŭstrujo. Internacia landerokodaĵo: AT-3. **Supr/a Aŭstr/uj/o.** Aŭstra federacia lando, okcidente de Malsupra Aŭstrujo. Internacia landerokodaĵo: AT-4.

**Aŭstronezi/o.** Tiu parto de la mondo, en kiu vivas aŭstroneziaj gentoj. **aŭstronezi/a.** Rilata al grupo de lingvoj kaj gentoj, kiuj originas el Tajvano *1* aŭ suda Ĉinujo, kaj kiuj estas disvastiĝintaj al la insularo de sudorienta Azio, Mikronezio, Nov-Gvineo, Melanezio, Polinezio kaj Madagaskaro.

**Azerbajĝan/o.** Lando situanta okcidente de Kaspio. Internacia landokodaĵo: AZ. **azerbajĝan/an/o.** Ano de Azerbajĝano. **azerbajĝan/a.** Rilata al azerbajĝananoj, Azerbajĝano aŭ la tjurka lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: aze). **Okcident/a Azerbajĝan/o.** Provinco de Irano, en ties nordokcidenta parto. Internacia landerokodaĵo: IR-04. **Orient/a Azerbajĝan/o.** Provinco de Irano, oriente de Okcidenta Azerbajĝano. Internacia landerokodaĵo: IR-03.

**Azi/o** (8OA). **Mal/grand-Azi/o.** Larĝa duoninsulo inter la Nigra Maro, la Egea Maro kaj Mediteraneo. **Orient-Azi/o.** Regiono pli-malpli konsistanta el Ĉinujo, Japanujo kaj Koreujo. **Sud-Azi/o.** Regiono de Azio nuntempe plej ofte difinata kiel konsistanta el la landoj Barato, Pakistano, Bangladeŝo, Nepalo, Butano, Srilanko, Maldivoj kaj ankaŭ (sed ne ĉiam) Afganujo; iafoje ankaŭ Birmo kaj Irano estas enkalkulataj.

**aztek/o.** Ano de grupo da indiĝenaj popoloj en centra Meksiko, kies kulturo floris tra meza Ameriko de la 14-a jarcento ĝis la alveno de la hispanaj konkerantoj en la jaro 1521. **aztek/a.** Rilata al aztekoj aŭ ilia kulturo: *azteka sunŝtono*; *azteka piramido*.

**Babilon/o.** Antikva urbo en Mezopotamio, fama pro siaj muregoj, sia sepŝtupa temploturo kaj siaj pendoĝardenoj. **babilon/an/o.** Ano de Babilono. **babilon/a.** Rilata al babilonanoj, Babilono aŭ la vario de la akada lingvo tie parolata: *babilona konfuzo de lingvoj* (Zamenhof).

**Bagdad/o 1** La ĉefurbo de Irako, ĉe Tigriso. **2** Gubernio de Irako, en kiu situas Bagdado *1*. Internacia landerokodaĵo: IQ-BG.

**Baham/o/j.** Insulara lando en Atlantiko, norde de Kubo. Internacia landokodaĵo: BS. **Grand/a Baham/o.** La plej norda insulo de Bahamoj, ĉirkaŭ 100 kilometrojn oriente de Florido.

**Balkan/o 1** Montaro en Bulgarujo. **2** Regiono de Turkmenujo, en ties okcidenta parto. Internacia landerokodaĵo: TM-B. **balkan/a.** Rilata al Balkano aŭ la Balkana Duoninsulo: *balkana kulturo*; *balkana muziko*.

**balt/o 1** Ano de unu el la gentoj, kiuj parolas baltan lingvon. **2** Ano de Baltujo. **Balt/uj/o.** Regiono konsistanta el Litovujo, Latvujo kaj Estonujo; historie ankaŭ kun kelkaj apudaj regionoj de Rusujo kaj orienta Prusujo. **balt/a.** Rilata al baltoj, baltaj lingvoj aŭ Baltujo. **balt/a/j lingv/o/j.** Hindeŭropaj lingvoj el la branĉo, al kiu apartenas la litova kaj latva lingvoj: *estonoj estas baltoj, sed ilia lingvo ne estas balta lingvo*.

**Bangladeŝ/o.** Lando ĉe la Bengala Golfo, inter Barato kaj Birmo. Internacia landokodaĵo: BD.

**Bankok/o.** La ĉefurbo de Tajlando.

**bantu/o.** Ano de vasta grupo da popoloj en la suda parto de Afriko, karakterizata precipe per la parenceco de la lingvoj. **bantu/a.** Rilata al bantuoj: *bantuaj lingvoj*.

**Barat/o.** Federacia regno en Azio, okupanta la plej grandan parton de la hinda subkontinento. Internacia landokodaĵo: IN.

**Barbad/o 1** La plej orienta insulo en Malgrandaj Antiloj. **2** Lando situanta sur Barbado *1*. Internacia landokodaĵo: BB.

**Barbud/o 1** Insulo de Antigvo kaj Barbudo, ĉirkaŭ 40 kilometrojn norde de Antigvo. **2** Dependa teritorio de Antigvo kaj Barbudo, situanta sur Barbudo *1*. Internacia landerokodaĵo: AG-10.

**Barcelon/o.** La ĉefurbo de Katalunujo *2*.

**Barejn/o.** Insulara lando en la Persa Golfo, inter Kataro kaj Sauda Arabujo. Internacia landokodaĵo: BH.

**baŝkir/o.** Ano de la ĉefgento de Baŝkirujo, parolanta tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: bak). **Baŝkir/uj/o.** Respubliko en la Rusuja Federacio, inter Volgo kaj Uralo, oriente de Tatarujo. Internacia landerokodaĵo: RU-BA. Nacia landerokodaĵo: 02. **baŝkir/a.** Rilata al baŝkiroj, la baŝkira lingvo aŭ Baŝkirujo.

**bavar/o 1** Ano de la ĉefgento de Bavarujo. **2** Ano de Bavarujo. **Bavar/uj/o.** Germana federacia lando en la sudorienta parto de Germanujo. Landerokodaĵo: DE-BY. **bavar/a.** Rilata al bavaroj, la bavara vario de la germana lingvo (internacia lingvokodaĵo: bar) aŭ Bavarujo.

**Belfast/o.** La ĉefurbo de Nord-Irlando.

**Beliz/o 1** Rivero en Belizo *2*, kiu enfluas la Kariban Maron norde de Belizo *3*. **2** Lando en Centr-Ameriko, ĉe la Kariba Maro, nordoriente de Gvatemalo. Internacia landokodaĵo: BZ. **3** Urbo en la orienta parto de Belizo *2*.

**belorus/o 1** Ano de la ĉefgento de Belorusujo, parolanta orientslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: bel). **2** Ano de Belorusujo. **Belorus/uj/o.** Lando en orienta Eŭropo, oriente de Pollando kaj sudoriente de Litovujo kaj Latvujo. Internacia landokodaĵo: BY. **belorus/a.** Rilata al belorusoj, la belorusa lingvo aŭ Belorusujo.

**bengal/o 1** Ano de la ĉefgento de Bengallando, parolanta sanskritidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: ben). **2** Ano de Bengallando. **Bengal/land/o.** Regiono konsistanta el Bangladeŝo kaj Okcidenta Bengallando. **Okcident/a Bengal/land/o.** Barata ŝtato, en la orienta parto de Barato, ĉe la Bengala Golfo. Internacia landerokodaĵo: IN-WB. **bengal/a.** Rilata al bengaloj, la bengala lingvo aŭ Bengallando: *bengala fajro* (artfajraĵo); *bengala tigro*; *Bengala Golfo*; *ni povas nun traduki inter 64 malsamaj lingvoj [...] kiel la bengala* (Kalocsay).

**Benin/o.** Lando en Okcident-Afriko, inter Togolando kaj Niĝerio. Internacia landokodaĵo: BJ.

**Beograd/o.** La ĉefurbo de Serbujo, kaj inter la jaroj 1918 kaj 2003 de Jugoslavujo.

**Bergen/o.** Havenurbo en la sudokcidenta parto de Norvegujo.

**Bern/o 1** Urbo en okcidenta Svislando, la sidejo de la svisaj parlamento kaj registaro. **2** Kantono en Svislando, kies ĉefurbo estas Berno *1*. Internacia landerokodaĵo: CH-BE.

**Bisaŭ/o.** La ĉefurbo de Gvineo-Bisaŭo.

**Bizanc/o.** Antikva greka urbo, ĉe Bosporo; alinomita Konstantinopolo en la jaro 330.

**Bjalistok/o.** Urbo en nordorienta Pollando, la naskiĝloko de Zamenhof.

**Bocvan/o.** Lando en suda Afriko, oriente de Namibio kaj norde de Sud-Afriko. Internacia landokodaĵo: BW.

**Bogot/o.** La ĉefurbo de Kolombio.

**bohem/o.** Ano de Bohemujo. **Bohem/uj/o.** Okcidenta parto de Ĉeĥujo, iama reĝlando.

**Bolonj/o.** Universitata urbo en la norda parto de Italujo, inter Florenco kaj Venecio.

**Bon/aer/o 1** La ĉefurbo de Argentino. **2** Provinco de Argentino, en kiu situas Bonaero *1*. Internacia landerokodaĵo: AR-B.

**bord/o** (FdE). **Ebur-Bord/o.** Lando en Okcident-Afriko, inter Ganao kaj Liberio. Internacia landokodaĵo: CI. **Lazur/a Bord/o.** La mediteranea bordo de sudorienta Francujo.

**Borne/o.** Insulo en sudorienta Azio, dividita inter Malajzio, Brunejo kaj Indonezio.

**bosn/o 1** Ano de la ĉefgento de Bosnujo kaj Hercegovino, parolanta sudslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: bos). **2** Ano de Bosnujo kaj Hercegovino. **Bosn/uj/o.** Regiono de la Balkana Duoninsulo, la norda parto de Bosnujo kaj Hercegovino. **Bosn/uj/o kaj Hercegovin/o.** Lando en la

Balkana Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: BA. **bosn/a.** Rilata al bosnoj, la bosna lingvo, Bosnujo, aŭ Bosnujo kaj Hercegovino.

**Boston/o.** Havenurbo en la nordorienta parto de Usono, ĉe Atlantiko.

**Bospor/o.** Markolo en nordokcidenta Turkujo, liganta la Nigran Maron kun la Marmora Maro kaj formanta la limon inter Eŭropo kaj Malgrand-Azio.

**Brajton/o.** Havenurbo en sudorienta Anglujo.

**Bratislav/o.** La ĉefurbo de Slovakujo.

**Brazavil/o.** La ĉefurbo de Respubliko Kongo (Kongo Brazavila).

**Brazilj/o.** La ĉefurbo de Brazilo.

**breton/o 1** Ano de la ĉefgento de Bretonujo, parolanta precipe la francan, dum malplimulto parolas la bretonan lingvon de kelta origino (internacia lingvokodaĵo: bre). **2** Ano de Bretonujo. **Breton/uj/o.** Duoninsula regiono en nordokcidenta Francujo. Internacia landerokodaĵo: FR-BRE. **breton/a.** Rilata al bretonoj, la bretona lingvo aŭ Bretonujo.

**Brunej/o.** Lando en sudorienta Azio, ĉe la Sudĉina Maro, en la norda parto de Borneo. **brunej/an/o.** Ano de Brunejo. **brunej/a.** Rilata al brunejanoj, Brunejo aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: kxd), parenca al la malaja.

**Brusel/o 1** La ĉefurbo de Belgujo. **2** Regiono de Belgujo, kiu entenas Bruselon *1*. Internacia landerokodaĵo: BE-BRU.

**Budapeŝt/o.** La ĉefurbo de Hungarujo.

**Bukareŝt/o.** La ĉefurbo de Rumanujo.

**Burkin/o.** Lando en Okcident-Afriko, norde de Ganao. Internacia landokodaĵo: BF.

**Burund/o.** Lando en orienta Afriko, inter Tanzanio, Ruando kaj Demokratia Respubliko Kongo. Internacia landokodaĵo: BI.

**Butan/o.** Lando en Sud-Azio, ĉe la orienta parto de Himalajo, inter Tibeto kaj Barato. Internacia landokodaĵo: BT.

**Cezar/o 1** Vira nomo, i.a. de la roma regnestro kaj generalo Gajo Julio Cezaro (100–44 antaŭ nia erao). **2** Imperiestra titolo en la Roma Regno: *redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro, kaj al Dio la propraĵon de Dio* (Nova Testamento). **cezar/a.** Rilata al Cezaro: *homo estas kiel papilio: li vivas en la suno de la cezara favoro* (Lidja Zamenhof).

**Ĉad/o 1** Granda lago oriente de Saharo. **2** Lando en meza Afriko, ĉe kies okcidenta landlimo troviĝas Ĉado *1*. Internacia landokodaĵo: TD.

**ĉeĉen/o.** Ano de la ĉefgento de Ĉeĉenujo, parolanta nordorientkaŭkazan lingvon (internacia lingvokodaĵo: che). **Ĉeĉen/uj/o.** Respubliko en la Rusuja Federacio, norde de Kartvelujo. Internacia landerokodaĵo: RU-CE. Nacia landerokodaĵo: 20. **ĉeĉen/a.** Rilata al ĉeĉenoj, la ĉeĉena lingvo aŭ Ĉeĉenujo.

**ĉeĥ/o 1** Ano de la ĉefgento de Ĉeĥujo, parolanta okcidentslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: ces). **2** Ano de Ĉeĥujo. **Ĉeĥ/uj/o.** Lando en Mez-Eŭropo, inter Aŭstrujo kaj Pollando. Internacia landokodaĵo: CZ. **ĉeĥ/a.** Rilata al ĉeĥoj, la ĉeĥa lingvo aŭ Ĉeĥujo.

**Ĉenaj/o.** La ĉefurbo de la barata ŝtato Tamillando.

**Ĉikag/o.** Urbo en Usono, ĉe la Grandaj Lagoj.

**Ĉili/o.** Lando ĉe la okcidenta marbordo de Sud-Ameriko. Internacia landokodaĵo: CL.

**ĉin/o** (9OA). **Hind/o/ĉin/uj/o.** La duoninsulo en sudorienta Azio, kiu entenas Birmon, Tajlandon, Vjetnamujon, Laoson, Kamboĝon kaj kontinentan Malajzion.

**ĉuvaŝ/o.** Ano de la ĉefgento de Ĉuvaŝujo, parolanta tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: chv). **Ĉuvaŝ/uj/o.** Respubliko en la Rusuja Federacio, ĉe Volgo, okcidente de Tatarujo. Internacia landerokodaĵo: RU-CU. Nacia landerokodaĵo: 21. **ĉuvaŝ/a.** Rilata al ĉuvaŝoj, la ĉuvaŝa lingvo aŭ Ĉuvaŝujo.

**Dak/o.** La ĉefurbo de Bangladeŝo.

**Dalas/o.** Urbo en Usono, en nordorienta Teksaso.

**Damask/o 1** La ĉefurbo de Sirio. **2** Gubernio de Sirio, en kiu situas Damasko *1*. Internacia landerokodaĵo: SY-DI.

**Dancig/o.** Iama nomo de Gdansko.

**Danub/o.** Granda eŭropa rivero, kiu fluas de la Nigra Arbaro en Germanujo, tra centra kaj sudorienta Eŭropo, ĝis ĝi enfluas la Nigran Maron.

**Delhi/o.** Urbo en norda Barato. **Nov-Delhi/o.** Urbo en la mezo de Delhio, kiu estas ties administra centro kaj la ĉefurbo de Barato.

**Dominik/o 1** Insulo en la mezo de Malgrandaj Antiloj. **2** Lando situanta sur Dominiko *1*. Internacia landokodaĵo: DM. **Dominik/a Respublik/o.** Lando en Grandaj Antiloj, en la orienta parto de la insulo, sur kiu situas ankaŭ Haitio. Internacia landokodaĵo: DO.

**dravid/o.** Ano de unu el la gentoj parolantaj dravidan lingvon. **dravid/a.** Rilata al dravidoj aŭ la dravidaj lingvoj. **dravid/a/j lingv/o/j.** Lingvofamilio konsistanta el la tamila kaj parencaj lingvoj, parolataj en Srilanko, suda Barato, centra Barato, orienta Barato kaj sudokcidenta Pakistano.

**Dresden/o.** Urbo en orienta Germanujo, la ĉefurbo de Saksujo *2*.

**Dublin/o 1** La ĉefurbo de la respubliko Irlando. **2** Graflando de la respubliko Irlando, en kiu situas Dublino *1*. Internacia landerokodaĵo: IE-D.

**Edinburg/o.** La ĉefurbo de Skotlando.

**Ege/o.** Mitologia reĝo de Ateno *2*.

**egipt/o 1** Ano de la ĉefgento de Egiptujo, parolinta dum antikveco afrikazian lingvon (internacia lingvokodaĵo: egy), sed parolanta nun araban lingvon (internacia lingvokodaĵo: arz). **2** Ano de Egiptujo. **Egipt/uj/o.** Lando en nordorienta Afriko, ĉe Nilo, konata pro sia civilizacio dum antikveco. Internacia landokodaĵo: EG. **egipt/a.** Rilata al egiptoj, la egiptaj lingvoj aŭ Egiptujo: *egiptaj piramidoj*; *egipta vario de la araba lingvo*.

**Elam/o.** Antikva regno, kiu ekzistis inter la 4-a kaj 1-a jarmiloj antaŭ nia erao en parto de la nuntempa Irano, oriente de Tigriso kaj de la Persa Golfo. **elam/an/o.** Ano de la antikva ĉefgento de Elamo. **elam/a.** Rilata al Elamo, elamanoj aŭ ilia lingvo (internacia lingvokodaĵo: elx).

**emir/o.** Titolo de princo, generalo aŭ guberniestro en islamaj landoj. **emir/land/o.** Teritorio, kies suvereno estas emiro. **Unu/iĝ/int/a/j Arab/a/j Emir/land/o/j.** Federacio de sep emirlandoj sur la Araba Duoninsulo, inter la Persa Golfo kaj la Omana Golfo. Internacia landokodaĵo: AE.

**era/o.** Kronologia sistemo, laŭ kiu oni kalkulas la tempon ekde aparta difinita tempopunkto: *la kristana erao*; *la erao de la fondo de Romo*. **ni/a era/o.** La erao kalkulata ekde la jaro 1 laŭ la gregoria kaj julia kalendaroj (ligita, laŭ tradiciaj kalkuloj, al la naskiĝo de Kristo): *Julio Cezaro estis murdita en la jaro 44 antaŭ nia erao*.

**Eritre/o.** Lando en orienta Afriko, ĉe la Ruĝa Maro, inter Sudano kaj Ĝibutio. Internacia landokodaĵo: ER.

**etrusk/o.** Ano de la ĉefgento de Etruskujo. **Etrusk/uj/o.** Antikva regno, kiu ekzistis en la okcidenta parto de meza Italujo dum la unua jarmilo antaŭ nia erao; ĝi fariĝis parto de la Roma Imperio en la jaro 27 antaŭ nia erao. **etrusk/a.** Rilata al etruskoj, la etruska lingvo aŭ Etruskujo.

**Eŭfrat/o.** Rivero en okcidenta Mezopotamio, kiu fluas de Turkujo tra Sirio ĝis Irako, kie ĝi kunfluas kun Tigriso ĉirkaŭ 200 kilometrojn nordokcidente de la Persa Golfo.

**Eŭrop/o** (FdE). **Mez-Eŭrop/o.** Regiono de Eŭropo nuntempe plej ofte difinata kiel konsistanta el la landoj Aŭstrujo, Ĉeĥujo, Germanujo, Hungarujo, Kroatujo, Liĥtenŝtejno, Pollando, Slovakujo, Slovenujo kaj Svislando; iafoje estas enkalkulataj ankaŭ kelkaj apudaj landoj. **hind/eŭrop/a/j lingv/o/j.** Familio konsistanta el lingvoj parolataj en preskaŭ ĉiuj partoj de Eŭropo kaj en Irano, Afganujo, Pakistano, norda Barato, Bangladeŝo, Srilanko kaj Maldivoj.

**eŭsk/o 1** Ano de la ĉefgento de Eŭskujo *1*. **2** Ano de Eŭskujo *1*. **Eŭsk/uj/o 1** Regiono dividita inter Hispanujo kaj Francujo, ĉe la okcidenta parto de Pireneoj. **2** Aŭtonoma regiono de Hispanujo, formanta la sudokcidentan parton de Eŭskujo *1*. Internacia landerokodaĵo: ES-PV. **eŭsk/a.** Rilata al eŭskoj, ilia lingvo (internacia lingvokodaĵo: eus) aŭ Eŭskujo.

**fenic/o.** Ano de la antikva ĉefgento de Fenicujo, parolanta ŝemidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: phn). **Fenic/uj/o.** Antikva mara imperio, kiu ekzistis ĉe la orienta parto de Mediteraneo, pli-malpli en la nunaj Libano kaj Sirio, ekde la tria jarmilo antaŭ nia erao; ĝi estis konkerita de la Roma

Regno en la jaro 64 antaŭ nia erao. **fenic/a.** Rilata al fenicoj, la fenica lingvo aŭ Fenicujo: *el la fenica alfabeto fontas la postaj hebrea, greka, latina kaj araba alfabetoj*.

**Fiĝi/o.** Insulara lando en la orienta parto de Melanezio, ĉirkaŭ 2000 kilometrojn nord-nordoriente de Nov-Zelando. Internacia landokodaĵo: FJ. **fiĝi/an/o.** Ano de Fiĝio. **fiĝi/a.** Rilata al fiĝianoj, Fiĝio aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: fij).

**Filadelfi/o.** Havenurbo en Usono, sudokcidente de Nov-Jorko.

**Filipin/o/j 1** Insularo en okcidenta Pacifiko. **2** Lando, kiu okupas Filipinojn *1*. Internacia landokodaĵo: PH. **filipin/an/o.** Ano de Filipinoj. **filipin/a.** Rilata al filipinanoj, Filipinoj aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: fil).

**filiŝt/o.** Ano de antikva popolo, loĝanta en teritorio ĉe Mediteraneo, okcidente de la Morta Maro, hodiaŭ parto de Egiptujo, Palestino kaj Israelo. **Filiŝt/uj/o.** Antikva regno, federacio de pluraj filiŝtaj urboŝtatoj, kiu ekzistis, ĝis la dua Babilona Imperio ĝin konkeris en la jaro 604 antaŭ nia erao.

**finn/o 1** Ano de ĉefgento de Finnlando, parolanta uralan lingvon (internacia lingvokodaĵo: fin). **2** Ano de Finnlando. **Finn/land/o.** Lando en norda Eŭropo, nordoriente de la Balta Maro. Internacia landokodaĵo: FI. **finn/a.** Rilata al finnoj, la finna lingvo aŭ Finnlando.

**flandr/o 1** Ano de la ĉefgento de Flandrujo, parolanta la nederlandan lingvon. **2** Ano de Flandrujo. **Flandr/uj/o 1** Iama graflando, nun dividita inter Nederlando, Belgujo kaj Francujo. **2** Regiono de Belgujo; ties norda, nederlandlingva parto. Internacia landerokodaĵo: BE-VLG. **flandr/a.** Rilata al flandroj, la flandra vario de la nederlanda lingvo aŭ Flandrujo.

**Florenc/o.** Urbo en centra Italujo, inter 1865 kaj 1871 la ĉefurbo de Italujo.

**Florid/o 1** Duoninsulo, en la sudoriento de Nord-Ameriko. **2** Usona ŝtato, kiu okupas Floridon *1*. Internacia landerokodaĵo: US-FL.

**Fortalez/o.** Havenurbo en la nordorienta parto de Brazilo.

**Frankfurt/o 1** Urbo en sudokcidenta Germanujo, ĉe la rivero Majno (**Frankfurt/o ĉe Majn/o**). **2** Urbo en orienta Germanujo, apud la pola landlimo, ĉe la rivero Odro (**Frankfurt/o ĉe Odr/o**).

**Friul/o.** Regiono en nordorienta Italujo. **friul/an/o.** Ano de Friulo. **friul/a.** Rilata al friulanoj, Friulo aŭ la latinida lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: fur).

**gael/o.** Ano de kelta popolo, loĝanta en Skotlando kaj Irlando. **gael/a.** Rilata al gaeloj, la kelta lingvo de Skotlando (internacia lingvokodaĵo: gla) aŭ la okcidenta branĉo de la keltaj lingvoj, al kiu apartenas la irlanda (internacia lingvokodaĵo: gle).

**Gabon/o.** Lando en meza Afriko, okcidente de Respubliko Kongo. Internacia landokodaĵo: GA.

**Gaj/o.** Vira nomo, en la periodo de la Roma Regno.

**galeg/o 1** Ano de la ĉefgento de Galegujo, parolanta iberolatinidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: glg). **2** Ano de Galegujo. **Galeg/uj/o.** Aŭtonoma regiono en la nordokcidenta parto de Hispanujo. Internacia landerokodaĵo: ES-GA. **galeg/a.** Rilata al galegoj, la galega lingvo aŭ Galegujo.

**Galici/o.** Regiono norde de Karpatoj, dividita inter Pollando kaj Ukrainujo.

**Galile/o.** Regiono en la nordo de Palestino kaj la sudo de Libano, kie Jesuo predikis komence.

**Gambi/o 1** Granda rivero en Okcident-Afriko, kiu fluas de norda Gvineo tra Senegalo ĝis Gambio *2*, kie ĝi enfluas Atlantikon. **2** Lando en Okcident-Afriko, preskaŭ tute ĉirkaŭata de Senegalo. Internacia landokodaĵo: GM.

**Gana/o.** Lando en Okcident-Afriko, ĉe la Gvinea Golfo. Internacia landokodaĵo: GH.

**Gang/o.** Granda rivero en Barato kaj Bangladeŝo, rigardata de la hinduoj kiel sankta.

**gaŭl/o.** Ano de grupo da antikvaj popoloj, parolanta keltan lingvon (internacia lingvokodaĵo: xtg, xcg) kaj loĝantaj en Gaŭlujo. **Gaŭl/uj/o.** Parto de okcidenta Eŭropo, responda pli-malpli al la nunaj Francujo, Belgujo, Luksemburgo, okcidenta Svislando, norda Italujo kaj la parto de Germanujo okcidente de Rejno; ĝin konkeris la Roma Regno en la 2-a kaj 1-a jarcentoj antaŭ nia erao. **gaŭl/a.** Rilata al gaŭloj, la gaŭla lingvo aŭ Gaŭlujo.

**Gdansk/o.** Havenurbo en Pollando, ĉe la Balta Maro.

**golf/o** (FdE). **Aden/a Golf/o.** Parto de la Hinda Oceano, inter Somalujo kaj Jemeno, kiu ligas la Ruĝan Maron al la Araba Maro. **Alask/a Golf/o.** Parto de Pacifiko, ĉe la suda marbordo de Alasko. **Bengal/a Golf/o.** Nordorienta parto de la Hinda Oceano, oriente de Barato kaj sude de Bangladeŝo.

**Gvine/a Golf/o.** Parto de Atlantiko, ĉe la suda bordo de Okcident-Afriko. **Kaliforni/a Golf/o.** Randa maro de Pacifiko, inter la Kalifornia Duoninsulo kaj la meksika ĉeftero. **Meksik/a Golf/o.** Maro formanta parton de Atlantiko, ĉirkaŭata precipe de Kubo kaj la nord-amerika kontinento. **Oman/a Golf/o.** Golfo nordoriente de Omano, liganta la Araban Maron kun la Persa Golfo. **Pers/a Golf/o.** Interna maro en okcidenta Azio, inter Irano kaj la Araba Duoninsulo. **Taj/land/a Golf/o.** Okcidenta parto de la Sudĉina Maro, sudokcidente de Hindoĉinujo.

**got/o.** Ano de tribo parolanta ĝermanan lingvon (internacia lingvokodaĵo: got), kiu invadis la Roman Imperion inter la 3-a kaj 5-a jarcentoj. **got/a.** Rilata al gotoj aŭ la gota lingvo.

**Gotenburg/o.** Havenurbo ĉe la okcidenta marbordo de Svedujo.

**Gregori/o.** Vira nomo, i.a. de pluraj antikvaj kaj mezepokaj ekleziuloj kaj papoj. **gregori/a.** Rilata al unu el la Gregorioj. **gregori/a kalendar/o.** Kalendaro enkondukita de papo Gregorio la 13-a en la jaro 1582 por anstataŭi la julian kalendaron.

**Grenad/o 1** Insulara lando en la suda parto de Malgrandaj Antiloj. Internacia landokodaĵo: GD. **2** La ĉefa insulo de Grenado *1*.

**Grenadin/o/j 1** Insularo inter la insuloj Sankta Vincento kaj Grenado *2*, kies norda parto apartenas al la lando Sankta Vincento kaj Grenadinoj, dum la suda parto apartenas al Grenado *1*. **2** Paroĥo de Sankta Vincento kaj Grenadinoj, situanta sur Grenadinoj *1*. Internacia landerokodaĵo: VC-06.

**Grizon/o.** Kantono de Svislando, en ties sudorienta parto, inter Liĥtenŝtejno kaj Italujo. Internacia landerokodaĵo: CH-GR.

**Gronland/o 1** Granda insulo inter Atlantiko kaj la Arkta Oceano, oriente de norda Kanado, plejparte kovrita de glacio kaj loĝata precipe de inuitoj. **2** Dependa teritorio de Danujo, situanta sur Gronlando *1*. Internacia landokodaĵo: GL. **gronland/an/o.** Ano de Gronlando. **gronland/a.** Rilata al gronlandanoj, Gronlando aŭ la inuita lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: kal).

**guĝarat/o 1** Ano de la ĉefgento de Guĝaratlando, parolanta sanskritidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: guj). **2** Ano de Guĝaratlando. **Guĝarat/land/o.** Barata ŝtato, en la okcidenta parto de Barato, ĉe la Araba Maro. Internacia landerokodaĵo: IN-GJ. **guĝarat/a.** Rilata al guĝaratoj, la guĝarata lingvo aŭ Guĝaratlando.

**Gujan/o.** Lando en la nordorienta parto de Sud-Ameriko, inter Venezuelo kaj Surinamo. Internacia landokodaĵo: GY. **Franc/a Gujan/o.** Regiono kaj transmara departemento de Francujo, en la nordorienta parto de Sud-Ameriko. Internacia land(er)okodaĵo: GF, FR-973.

**Gvadelup/o 1** Insularo en la mezo de Malgrandaj Antiloj, inter Dominiko kaj Antigvo. **2** Regiono kaj transmara departemento de Francujo, sur Gvadelupo *1*. Internacia land(er)okodaĵo: GP, FR-971. **gvadelup/an/o.** Ano de Gvadelupo. **gvadelup/a.** Rilata al gvadelupanoj, Gvadelupo aŭ la kreola lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: gcf), bazita sur la franca.

**Gvine/o** (8OA) Lando en Okcident-Afriko. Internacia landokodaĵo: GN. **Gvine/o-Bisaŭ/o.** Lando en Okcident-Afriko, inter Senegalo kaj Gvineo. Internacia landokodaĵo: GW. **Ekvator/a Gvine/o.** Lando en meza Afriko, inter Kameruno kaj Gabono. Internacia landokodaĵo: GQ. **Nov-Gvine/o.** Granda insulo norde de Aŭstralio.

**Ĝakart/o.** La ĉefurbo de Indonezio.

**Ĝenev/o 1** Urbo en la sudokcidenta parto de Svislando. **2** Kantono de Svislando, kies ĉefurbo estas Ĝenevo *1*. Internacia landerokodaĵo: CH-GE.

**ĝerman/o.** Ano de historia gentaro, de kiu devenas la nuntempaj germanoj, nederlandanoj, angloj, svedoj, norvegoj, danoj kaj aliaj. **Ĝerman/uj/o.** Parto de Eŭropo, oriente de Rejno kaj norde de Danubo, en kiu loĝis la ĝermanoj. **ĝerman/a.** Rilata al ĝermanoj aŭ la ĝermanaj lingvoj.

**Ĝibraltar/o.** Dependa teritorio de Britujo, ĉe la suda pinto de la Ibera Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: GI.

**Ĝibuti/o 1** Lando en orienta Afriko, ĉe la suda ekstremaĵo de la Ruĝa Maro. Internacia landokodaĵo: DJ. **2** La ĉefurbo de Ĝibutio *1*.

**Hag/o.** Urbo en Nederlando, en Sud-Holando, sidejo de la nederlandaj parlamento kaj registaro.

**Haiti/o.** Lando en Grandaj Antiloj, en la okcidenta parto de la insulo, sur kiu situas ankaŭ Dominika Respubliko. Internacia landokodaĵo: HT. **haiti/an/o.** Ano de Haitio. **haiti/a.** Rilata al haitianoj, Haitio aŭ la kreola lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: hat), bazita sur la franca.

**Hamburg/o 1** Havenurbo en norda Germanujo. **2** Germana federacia lando, en kiu situas Hamburgo *1*. Internacia landerokodaĵo: DE-HH.

**Hanoj/o**. La ĉefurbo de Vjetnamujo.

**Havaj/o 1** La plej granda insulo de la Havaja Insularo. **2** Usona ŝtato, kiu okupas la Havajan Insularon preskaŭ tute. Internacia landerokodaĵo: US-HI. **havaj/an/o.** Ano de Havajo. **havaj/a.** Rilata al havajanoj, Havajo aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: haw).

**Havan/o.** La ĉefurbo de Kubo.

**Helsink/o.** La ĉefurbo de Finnlando.

**Hercegovin/o.** Regiono sur la Balkana Duoninsulo, la suda parto de Bosnujo kaj Hercegovino.

**Himalaj/o.** Montaro, kun la plej altaj pintoj en la mondo, norde de la hinda subkontinento.

**hind/o 1** Ano de unu el la gentoj de la hinda subkontinento, precipe en kuntekstoj, en kiuj temas pri historia periodo antaŭ la fondiĝo de la modernaj sendependaj sud-aziaj ŝtatoj. **2** Baratano. **Hind/uj/o 1** La hinda subkontinento: *la ideo de Kolumbo, ke devas ekzisti okcidenta vojo Hindujon* (Zamenhof). **2** La Brita Hinda Imperio, kiu situis en Hindujo *1*. **3** Barato. **Brit/a Hind/uj/o.** Tiu parto de la Brita Hinda Imperio, kiu estis sub rekta regado de Britujo (diference de la vasalaj princlandoj ene de tiu imperio). **Nederland/a Hind/uj/o.** Kolonio de Nederlando, kiu situis en la teritorio de la nuna Indonezio. **hind/a.** Rilata al la hinda subkontinento, precipe en kuntekstoj, kie gravas historiaj tradicioj: *hinda civilizacio*, *arto*, *filozofio*; *la personaro de "hinda restoracio" en okcidenta lando ofte devenas el Bangladeŝo aŭ Pakistano*.

**hindi/a lingv/o.** Sanskritida lingvo parolata en norda Barato (internacia lingvokodaĵo: hin), kiun karakterizas altnivela uzo de sanskritaj pruntvortoj.

**hindu/o.** Ano de hinduismo. **hindu/ism/o.** Politeisma religio, kies sanktaj tekstoj estas en Sanskrito kaj kies anoj plejparte loĝas en Barato kaj Nepalo.

**Hiroŝim/o 1** Havenurbo en Japanujo, trafita de usona atombombo la 6-an de Aŭgusto 1945. **2** Gubernio de Japanujo, kies ĉefurbo estas Hiroŝimo *1*. Internacia landerokodaĵo: JP-34.

**Holand/o.** Parto de Nederlando, laŭlonge de la Norda Maro. **Nord-Holand/o.** Provinco en Nederlando, formanta la nordan parton de Holando. Internacia landerokodaĵo: NL-NH. **Sud-Holand/o.** Provinco en Nederlando, formanta la sudan parton de Holando. Internacia landerokodaĵo: NL-ZH.

**Hondur/o.** Lando en Centr-Ameriko, inter Gvatemalo kaj Nikaragvo. Internacia landokodaĵo: HN.

**Honkong/o 1** Insulo en suda Ĉinujo, en la norda parto de la Sudĉina Maro. **2** Urbo en Ĉinujo, kies suda parto estas Honkongo *1*. **3** Teritorio kun speciala statuso en suda Ĉinujo, en kiu situas Honkongo *2*. Internacia land(er)okodaĵo: HK, CN-HK.

**Honŝu/o.** La ĉefa insulo de la japana insularo.

**hun/o.** Ano de azia popolo, kiu invadis Eŭropon en la 4-a kaj 5-a jarcentoj.

**ĥalde/o.** Ano de la asiria ĉefgento de Ĥaldeujo, parolanta ŝemidan lingvon. **Ĥalde/uj/o.** Regno en la sudorienta parto de Mezopotamio, kiu formiĝis en la 10-a jarcento antaŭ nia erao; asimilita al la dua Babilona Imperio en la 6-a jarcento antaŭ nia erao. **ĥalde/a.** Rilata al ĥaldeoj, la ĥaldea lingvo aŭ Ĥaldeujo.

**iber/o 1** Ano de iu el la popoloj, kiuj loĝis en Iberujo dum la prahistorio. **2** Ano de iu el la nunaj landoj de Iberujo. **Iber/uj/o.** Ibera Duoninsulo. **iber/a.** Rilata al iberoj, iberaj lingvoj aŭ Iberujo: *ibera skolo de Esperanta literaturo*.

**imperi/o** (FdE). **Akad/a Imperi/o.** Imperio regata de Akado, kiu disfloris en Mezopotamio inter la 24-a kaj 22-a jarcentoj antaŭ nia erao. **Babilon/a Imperi/o.** Ĉiu el la imperioj en Mezopotamio regataj de Babilono inter la 2-a jarmilo kaj la jaro 539 antaŭ nia erao. **Bizanc/a Imperi/o.** Imperio regata de Konstantinopolo kaj ekzistanta de la jaro 395 ĝis la jaro 1453; la orienta parto de la Roma Imperio post ties divido. **Inka/a Imperi/o.** La plej granda imperio en Ameriko antaŭ la invado de la hispanoj, ekestinta en la altaj regionoj de la nuna Peruo, kaj fine ampleksinta grandan parton de la Pacifika flanko de Sud-Ameriko. **Otoman/a Imperi/o.** Imperio, kiu regis super grandaj partoj de sudorienta Eŭropo, okcidenta Azio kaj norda Afriko inter la 14-a jarcento kaj la jaro 1922; ĝi konkeris la Bizancan Imperion en la jaro 1453. **Pers/a Imperi/o.** Imperio establita en Irano en la jaro 550 antaŭ nia erao, poste ampleksinta grandan teritorion inter Egiptujo, la Balkana Duoninsulo kaj centra Azio, ĝis en la jaro 330

antaŭ nia erao konkeris ĝin Aleksandro la Granda. **Rom/a Imperi/o.** Imperia formo de la Roma Regno ekde la jaro 27 antaŭ nia erao.

**Indonezi/o.** Lando sude de kontinenta Azio, konsistanta precipe el Sumatro, Javo, la suda parto de Borneo, kaj la okcidenta parto de Nov-Gvineo. Internacia landokodaĵo: ID. **indonezi/an/o.** Ano de Indonezio. **indonezi/a.** Rilata al indonezianoj, Indonezio aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: ind).

**Indus/o.** Granda rivero en Sud-Azio, fluanta de Tibeto tra Kaŝmiro kaj Pakistano, kie ĝi enfluas la Araban Maron apud Karaĉio.

**inka/o.** Ano de la popolo de la Inkaa Imperio. **inka/a.** Rilata al inkaoj aŭ la Inkaa Imperio.

**insul/o** (FdE). **Arab/a Du/on/insul/o.** Duoninsulo en okcidenta Azio, nordoriente de Afriko, inter la Ruĝa Maro, la Araba Maro, la Omana Golfo kaj la Persa Golfo. **Balkan/a Du/on/insul/o.** Duoninsulo en sudorienta Eŭropo, inter Adriatiko, la Egea Maro, Mediteraneo kaj la Nigra Maro. **Iber/a Du/on/insul/o.** Duoninsulo en sudokcidenta Eŭropo, sude de Pireneoj. **Ital/a Du/on/insul/o.** Sudeŭropa mediteranea duoninsulo, sur kiu situas granda parto de Italujo, Sanmarino kaj Vatikano. **Kaliforni/a Du/on/insul/o.** Duoninsulo en nordokcidenta Meksiko, etendiĝanta sude de la usona landlimo, laŭlonge de Pacifiko. **Kore/a Du/on/insul/o.** Duoninsulo en orienta Azio, inter la Flava Maro kaj la Japana Maro. **Havaj/a Insul/ar/o.** Insularo en la norda parto de Polinezio, ĉirkaŭ 3650 kilometrojn okcidente de la nord-amerika kontinento. **Kajman/a Insul/ar/o 1** Insularo sude de Kubo kaj nordoriente de Honduro, en Grandaj Antiloj. **2** Transmara teritorio de Britujo, en la okcidenta parto de la Kariba Maro, sur la Kajmana Insularo *1*. Internacia landokodaĵo: KY.

**inuit/o.** Ano de grupo de indiĝenaj popoloj, loĝantaj en Gronlando, Kanado kaj Alasko.

**islam/o.** Religio, kies sankta libro estas la Korano. **islam/an/o.** Kredanto de islamo.

**Istanbul/o 1** Havenurbo ĉe Bosporo, kies historia centro situas en la eŭropa parto de Turkujo. **2** Provinco de Turkujo, en kiu situas Istanbulo *1*. Internacia landerokodaĵo: TR-34.

**Jamajk/o 1** Insulo en Grandaj Antiloj, sude de Kubo. **2** Lando sur Jamajko *1*. Internacia landokodaĵo: JM. **jamajk/an/o.** Ano de Jamajko. **jamajk/a.** Rilata al jamajkanoj, Jamajko aŭ la kreola lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: jam), bazita sur la angla.

**Jav/o.** La ĉefa insulo de Indonezio. **jav/an/o.** Ano de Javo. **jav/a.** Rilata al javanoj, Javo aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: jav): *java homo* (speco de prahomo).

**Jemen/o.** Lando en la sudokcidenta parto de la Araba Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: YE.

**Jerusalem/o 1** Urbo situanta sur altebenaĵo inter Mediteraneo kaj la Morta Maro; sankta urbo de la religioj hebrea, kristana kaj islama. **2** Distrikto de Israelo, en kiu situas Jerusalemo *1*. Internacia landerokodaĵo: IL-JM.

**Jokoham/o.** Havenurbo en Japanujo, sude de Tokio.

**Jordan/o.** Rivero, kiu fluas de la limo inter Libano kaj Sirio tra Israelo kaj la Galilea Lago, ĝis ĝi enfluas la Mortan Maron.

**Jordani/o.** Lando en okcidenta Azio, ĉe la orienta bordo de Jordano. Internacia landokodaĵo: JO.

**Jork/o** (FdE). Urbo en nordorienta Anglujo, ĉe la kunfluejo de du riveroj, fondita de la Roma Regno en la jaro 71. **Nov-Jork/o 1** Usona ŝtato, en la nordorienta parto de Usono. Internacia landerokodaĵo: US-NY. **2** Havenurbo en Usono, ĉe Atlantiko, la plej granda urbo de Nov-Jorko *1*.

**jorub/o.** Ano de la ĉefgento de Jorubolando, parolanta atlantikkongan lingvon (internacia lingvokodaĵo: yor). **Jorub/o/land/o, Jorub/uj/o.** Regiono en Okcident-Afriko, eksa regno, konsistanta el partoj de Niĝerio, Benino kaj Togolando. **jorub/a.** Rilata al joruboj, la joruba lingvo aŭ Jorubolando.

**jugoslav/o.** Ano de Jugoslavujo. **Jugoslav/uj/o.** Inter la jaroj 1918 kaj 2003, federacia regno sur la Balkana Duoninsulo, kiu konsistis el Bosnujo kaj Hercegovino, Kroatujo, Makedonujo *4*, Montenegro, Serbujo kaj Slovenujo. Internacia landokodaĵo: YU. **jugoslav/a.** Rilata al jugoslavoj aŭ Jugoslavujo.

**Juli/o.** Vira nomo, i.a. de Julio Cezaro. **juli/a kalendar/o.** Kalendaro enkondukita de Julio Cezaro en la jaro 46 antaŭ nia erao. **Juli/in/o.** Virina nomo (karesformo: Julinjo).

**Kaboverd/o.** Insulara lando en Atlantiko, inter 600 kaj 850 kilometrojn okcidente de Senegalo. Internacia landokodaĵo: CV. **kaboverd/an/o.** Ano de Kaboverdo. **kaboverd/a.** Rilata al kaboverdanoj, Kaboverdo aŭ la kreola lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: kea), bazita sur la portugala.

**Kair/o 1** La ĉefurbo de Egiptujo. **2** Gubernio de Egiptujo, en kiu situas Kairo *1*. Internacia landerokodaĵo: EG-C.

**kajman/o.** Besto el la sama familio kiel aligatoro, kun dentoj pli longaj kaj pintaj ol ĉi ties, vivanta en meza Ameriko kaj Sud-Ameriko; ĝin karakterizas ventra kiraso formita de sinkovrantaj dupartaj ostecaj skvamoj kaj manko de osteca naza vando (familio *Alligatoridae*, subfamilio *Caimaninae*, precipa genro *Caiman*).

**Kaliforni/o.** Usona ŝtato, laŭlonge de Pacifiko. Internacia landerokodaĵo: US-CA. **Mal/supr/a Kaliforni/o.** Meksika ŝtato, en la norda parto de la Kalifornia Duoninsulo. Internacia landerokodaĵo: MX-BCN. **Sud/a Mal/supr/a Kaliforni/o.** Meksika ŝtato, en la suda parto de la Kalifornia Duoninsulo. Internacia landerokodaĵo: MX-BCS.

**Kamboĝ/o.** Lando en Hindoĉinujo, sude de Laoso, ĉe la Tajlanda Golfo. Internacia landokodaĵo: KH.

**Kamerun/o.** Lando en meza Afriko, ĉe la Gvinea Golfo, sudoriente de Niĝerio. Internacia landokodaĵo: CM.

**Kanton/o 1** Havenurbo en suda Ĉinujo, ĉe la norda bordo de la Sudĉina Maro. **2** Provinco en suda Ĉinujo, kies ĉefurbo estas Kantono *1*. Internacia landerokodaĵo: CN-GD.

**Karaĉi/o.** Havenurbo en Pakistano.

**karib/o 1** Ĉeftera karibo. **2** Insula karibo. **ĉef/ter/a karib/o.** Ano de indiĝena gento vivanta ĉe la riveroj kaj marbordo de la nordokcidenta parto de kontinenta Sud-Ameriko. **insul/a karib/o**. Ano de indiĝena gento vivanta nun en Dominiko kaj en Sankta Vincento kaj Grenadinoj, sed antaŭe ankaŭ sur aliaj insuloj en la Kariba Maro. **karib/a.** Rilata al kariboj aŭ la karibaj lingvoj.

**Karpat/o/j.** Montaro en Mez-Eŭropo, etendiĝanta arkoforme de Slovakujo ĝis Rumanujo.

**kartvel/o 1** Ano de la ĉefgento de Kartvelujo, parolanta sudkaŭkazan lingvon (internacia lingvokodaĵo: kat). **2** Ano de Kartvelujo. **Kartvel/uj/o.** Lando sude de Kaŭkazo *1* kaj nordoriente de Turkujo. Internacia landokodaĵo: GE. **kartvel/a.** Rilata al kartveloj, la kartvela lingvo aŭ Kartvelujo.

**Kaspi/o.** Interna maro kaj la plej granda lago en la mondo, ĉe la limo inter Eŭropo kaj Azio, en kiun enfluas Volgo.

**Kaŝmir/o.** Iama hinda reĝlando, nun dividita inter Barato, Pakistano kaj Ĉinujo. **kaŝmir/an/o.** Ano de Kaŝmiro. **kaŝmir/a.** Rilata al kaŝmiranoj, Kaŝmiro aŭ la sanskritida lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: kas).

**katalun/o 1** Ano de la ĉefgento de Katalunujo *1*, parolanta okcitanlatinidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: cat). **2** Ano de Katalunujo *1*. **Katalun/uj/o 1** Regiono en la nordorienta parto de Iberujo, dividita inter Hispanujo, Francujo kaj Andoro. **2** Aŭtonoma regiono en nordorienta Hispanujo, parto de Katalunujo *1*. Internacia landerokodaĵo: ES-CT. **katalun/a.** Rilata al katalunoj, la kataluna lingvo aŭ Katalunujo.

**Katar/o.** Duoninsula lando en la nordorienta parto de la Araba Duoninsulo, ĉe la Persa Golfo. Internacia landokodaĵo: QA.

**Katmandu/o.** La ĉefurbo de Nepalo.

**Kaŭkaz/o 1** Montaro inter la Nigra Maro kaj Kaspio. **2** Kaŭkazio. **kaŭkaz/a.** Rilata al Kaŭkazo aŭ la multaj lingvoj parolataj en Kaŭkazio.

**Kaŭkazi/o.** Regiono ĉiuflanke de la montaro Kaŭkazo, inter la Nigra Maro kaj Kaspio.

**kazaĥ/o 1** Ano de la ĉefgento de Kazaĥujo, parolanta tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: kaz). **2** Ano de Kazaĥujo. **Kazaĥ/uj/o.** Lando, situanta ĉefe en centra Azio kaj parte en orienta Eŭropo, nordoriente de Kaspio. Internacia landokodaĵo: KZ. **kazaĥ/a.** Rilata al kazaĥoj, la kazaĥa lingvo aŭ Kazaĥujo.

**Kebek/o.** Urbo en orienta Kanado.

**Kebeki/o.** Franclingva provinco de Kanado, kies ĉefurbo estas Kebeko. Internacia landerokodaĵo: CA-QC. **Rimarko:** Ĉi tiu oficialigo de "Kebeki/o" ne estu uzata kiel pravigo por la uzado de aliaj Esperantaj nomoj de landoj aŭ subdividoj, kiuj finiĝas per "-io" malgraŭ manko de internacie uzata nomformo, kiu pravigas tiun esperantigon. "Kebeki/o" estas ĉi-rilate escepta, ĉar ĉi tiu formo jam estas tiel forte kaj senkonteste enradikiĝinta en la Esperantan lingvouzon, ke ĉi-okaze la jama lingvouzo pli gravas ol principoj ĝenerale observindaj ĉe esperantigo. Vidu ankaŭ la ĉi-rilatan klarigon en la sekcio *Rekomendoj pri nomoj de landoj kaj iliaj subdividoj* de la enkonduko al ĉi tiu dokumento.

**kelt/o 1** Ano de hindeŭropa gentaro, kiu invadis grandan parton de Eŭropo kaj Malgrand-Azio dum la 3-a jarcento antaŭ nia erao. **2** Homo, kiu devenas de keltoj *1* aŭ de regiono, en kiu kelta lingvo estas parolata, aŭ estis parolata en pli moderna tempo. **kelt/a.** Rilata al keltoj aŭ keltaj lingvoj.

**Kembriĝ/o.** Universitata urbo en Anglujo, norde de Londono.

**Kenj/o 1** La plej alta monto en Kenjo *2*. **2** Lando en ekvatora orienta Afriko. Internacia landokodaĵo: KE.

**kimr/o 1** Ano de la ĉefgento de Kimrujo. **2** Ano de Kimrujo. **Kimr/uj/o.** Lando en okcidenta Britujo. Internacia landerokodaĵo: GB-WLS. **kimr/a.** Rilata al kimroj, ilia lingvo aŭ Kimrujo: *kimra lingvo* (kelta lingvo, internacia lingvokodaĵo: cym). **Nova Sud-Kimr/uj/o.** Aŭstralia ŝtato, en la orienta parto de Aŭstralio. Internacia landerokodaĵo: AU-NSW.

**Kinŝas/o.** La ĉefurbo de Demokratia Respubliko Kongo (Kongo Kinŝasa).

**Kiot/o 1** Eksa ĉefurbo de Japanujo, nordoriente de Osako. **2** Gubernio de Japanujo, en kiu situas Kioto *1*. Internacia landerokodaĵo: JP-26.

**Kipr/o 1** Insulo en la orienta parto de Mediteraneo, nordokcidente de Libano. **2** Lando sur Kipro *1*, kies norda parto estas okupata de Turkujo ekde la jaro 1974. Internacia landokodaĵo: CY.

**kirgiz/o 1** Ano de la ĉefgento de Kirgizujo, parolanta tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: kir). **2** Ano de Kirgizujo. **Kirgiz/uj/o.** Lando en meza Azio, inter Kazaĥujo kaj Ĉinujo. Internacia landokodaĵo: KG. **kirgiz/a.** Rilata al kirgizoj, la kirgiza lingvo aŭ Kirgizujo.

**Kiribat/o.** Insulara lando en la sudorienta parto de Mikronezio, ĉe la ekvatoro. Internacia landokodaĵo: KI.

**Kolkat/o.** Havenurbo en Barato, la ĉefurbo de Okcidenta Bengallando.

**Kolombi/o.** Lando en la nordokcidenta parto de Sud-Ameriko, inter Venezuelo kaj Ekvadoro. Internacia landokodaĵo: CO.

**Kolonj/o.** Urbo en okcidenta Germanujo, ĉe Rejno.

**Kolorad/o 1** Granda rivero en la sudokcidenta parto de Nord-Ameriko, kiu fluas de la Roka Montaro en Kolorado *2* ĝis Kalifornio, kie ĝi fluas laŭlonge de ties sudorienta bordo kaj tra nordokcidenta Meksiko, kie ĝi enfluas la Kalifornian Golfon ĉe ties norda ekstremaĵo. **2** Usona ŝtato, norde de Nov-Meksiko. Internacia landerokodaĵo: US-CO.

**Kolumb/o.** Familia nomo, i.a. de la fama esplorvojaĝanto Kristoforo Kolumbo (proks. 1451–1506), kiu ŝipveturis de Eŭropo al Ameriko kvarfoje inter 1492 kaj 1504: *ovo de Kolumbo* (eltrovaĵo, kiu poste ŝajnas simpla).

**Komor/o/j 1** Insularo en sudorienta Afriko, en la Hinda Oceano, oriente de Mozambiko kaj nordokcidente de Madagaskaro. **2** Lando, kiu okupas grandan parton de Komoroj *1*. Internacia landokodaĵo: KM. **Grand/a Komor/o.** La ĉefinsulo de Komoroj *2*. **komor/an/o.** Ano de Komoroj. **komor/a.** Rilata al komoranoj, Komoroj aŭ iu el la kvar bantuaj lingvoj tie parolataj (internaciaj lingvokodaĵoj: swb, wlc, wni, zdj).

**Kong/o 1** Granda rivero en meza Afriko. **2** Mez-afrika lando oriente de Kongo *1*, **Demokrati/a Respublik/o Kong/o** (**Kong/o Kinŝas/a**, internacia landokodaĵo: CD). **3** Mez-afrika lando okcidente de Kongo *1*, **Respublik/o Kong/o** (**Kong/o Brazavil/a**, internacia landokodaĵo: CG).

**Konstantinopol/o.** Dua ĉefurbo de la Roma Imperio (330-395), poste la ĉefurbo de la Bizanca Imperio (395-1453) kaj de la Otomana Imperio (1453-1922); antaŭ la jaro 330 nomata Bizanco kaj post 1930 Istanbulo.

**kontinent/o** (1OA). **sub/kontinent/o.** Parto de kontinento, rigardata kiel geologie, geografie aŭ politike aparta regiono. **hind/a sub/kontinent/o.** Regiono de Azio formanta vastan triangulon sude de Himalajo, inter la Araba Maro kaj la Bengala Golfo; ĝi entenas Baraton, Pakistanon, Bangladeŝon, Nepalon kaj Butanon; iafoje ankaŭ Srilanko kaj Maldivoj estas enkalkulataj, precipe en kulturgeografiaj kaj geologiaj kuntekstoj.

**Kopenhag/o.** La ĉefurbo de Danujo.

**kore/o 1** Ano de la ĉefgento de Koreujo, parolanta la korean lingvon (internacia lingvokodaĵo: kor). **2** Ano de Koreujo. **Kore/uj/o.** Lando en orienta Azio, sur la Korea Duoninsulo; de post la jaro 1948, dividita en du landojn: Nord-Koreujo kaj Sud-Koreujo. **Nord-Kore/uj/o.** Lando en orienta Azio, al kiu apartenas la norda parto de la Korea Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: KP. **Sud-Kore/uj/o.** Lando en

orienta Azio, al kiu apartenas la suda parto de la Korea Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: KR. **kore/a.** Rilata al koreoj, la korea lingvo aŭ Koreujo.

**Kornval/o.** Graflando kaj iama reĝlando en la sudokcidenta parto de Anglujo. Internacia landerokodaĵo: GB-CON. **kornval/an/o.** Ano de Kornvalo. **kornval/a.** Rilata al kornvalanoj, Kornvalo aŭ la kelta lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: cor).

**Korsik/o 1** Insulo de Francujo, en okcidenta Mediteraneo, sudoriente de la kontinenta parto de Francujo. **2** Regiono kun speciala statuso, sur Korsiko *1*, konsistanta el la departementoj Sud-Korsiko kaj Supra Korsiko. **korsik/an/o.** Ano de Korsiko. **Sud-Korsik/o.** Departemento en Francujo, kiu estas la suda parto de Korsiko *2*. Internacia landerokodaĵo: FR-2A. **Supr/a Korsik/o.** Departemento en Francujo, kiu estas la norda parto de Korsiko *2*. Internacia landerokodaĵo: FR-2B. **korsik/a.** Rilata al korsikanoj, Korsiko aŭ la italolatinida lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: cos).

**Kosov/o.** Lando sur la Balkana Duoninsulo, inter Montenegro kaj Nord-Makedonujo. Internacia landokodaĵo: XK.

**Krakov/o.** Urbo en la sudo de Pollando.

**Krime/o.** Duoninsulo en la norda parto de la Nigra Maro.

**Kristofor/o.** Vira nomo, i.a. de Kolumbo. **Sankt/a Kristofor/o 1** La ĉefa insulo de Sankta Kristoforo kaj Neviso. **2** Ŝtato de Sankta Kristoforo kaj Neviso, sur Sankta Kristoforo *1*. Internacia landerokodaĵo: KN-K. **Sankt/a Kristofor/o kaj Nevis/o.** Insulara lando en la norda parto de Malgrandaj Antiloj, okcidente de Antigvo kaj Barbudo, konsistanta el Sankta Kristoforo *1* kaj la pli malgranda insulo Neviso. Internacia landokodaĵo: KN.

**kroat/o 1** Ano de la ĉefgento de Kroatujo, parolanta sudslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: hrv). **2** Ano de Kroatujo. **Kroat/uj/o.** Lando sur la Balkana Duoninsulo, inter Slovenujo, Bosnujo kaj Adriatiko. Internacia landokodaĵo: HR. **kroat/a.** Rilata al kroatoj, la kroata lingvo aŭ Kroatujo. **serb/o/kroat/a.** Rilata al la bosna, kroata, montenegra kaj serba lingvoj, rigardataj kiel unu lingvo. Internacia lingvokodaĵo: hbs.

**kurd/o 1** Ano de la ĉefgento de Kurdujo, parolanta iranan lingvon (internaciaj lingvokodaĵoj: ckb, kmr, sdh). **2** Ano de Kurdujo. **Kurd/uj/o 1** Regiono en okcidenta Azio, dividita inter Armenujo, Irano, Irako, Sirio kaj Turkujo, precipe loĝata de kurdoj. **2** Provinco de Irano, ĉe la iraka landlimo. Internacia landerokodaĵo: IR-12. **3** Aŭtonoma regiono de Irako, en ties nordorienta parto. Internacia landerokodaĵo: IQ-KR. **kurd/a.** Rilata al kurdoj, la kurda lingvo aŭ Kurdujo.

**Kuvajt/o 1** La ĉefurbo de Kuvajto *2*. **2** Lando sur la Araba Duoninsulo, ĉe la norda parto de la Persa Golfo. Internacia landokodaĵo: KW.

**lag/o** (FdE). **Galile/a Lag/o.** Lago en la nordorienta parto de Israelo. **Grand/a/j Lag/o/j.** Kvin grandaj lagoj inter Kanado kaj Usono, en la orienta parto de tiuj landoj.

**Lagos/o 1** Urbo en sudokcidenta Niĝerio, ĉe la Gvinea Golfo; eksa ĉefurbo de Niĝerio. **2** Ŝtato de Niĝerio, en ties sudokcidenta parto, ĉe la Gvinea Golfo. Internacia landerokodaĵo: NG-LA.

**Laos/o.** Lando en Hindoĉinujo, inter Tajlando kaj Vjetnamujo. Internacia landokodaĵo: LA.

**Latin/o.** La lingvo parolata de la antikvaj romanoj (internacia lingvokodaĵo: lat), kaj hodiaŭ ankoraŭ uzata en la romkatolika eklezio kaj en diversaj sciencaj fakoj: (figurasence) *venis fino al mia latino* (Zamenhof). **latin/a.** Rilata al Latino: *latina traduko*; *la latina* (lingvo). **latin/id/a/j lingv/o/j.** Lingvoj devenintaj el Latino.

**Lesb/o.** Insulo de Grekujo en la Egea Maro, hejmo de la samseksema poetino Sapfo. **lesb/an/in/o.** (figurasence) Samseksemulino.

**Lesot/o.** Lando en suda Afriko, tute ĉirkaŭata de Sud-Afriko. Internacia landokodaĵo: LS.

**Liĥtenŝtejn/o.** Lando en Alpoj, inter Aŭstrujo kaj Svislando. Internacia landokodaĵo: LI.

**Lill/o.** Urbo en norda Francujo, oriente de Bulonjo ĉe Maro, proksima al la belga landlimo.

**Lisbon/o 1** La ĉefurbo de Portugalujo. **2** Distrikto de Portugalujo, en kiu situas Lisbono *1*. Internacia landerokodaĵo: PT-11.

**litov/o 1** Ano de la ĉefgento de Litovujo, parolanta baltan lingvon (internacia lingvokodaĵo: lit). **2** Ano de Litovujo. **Litov/uj/o.** Lando ĉe la Balta Maro, sude de Latvujo. Internacia landokodaĵo: LT. **litov/a.** Rilata al litovoj, la litova lingvo aŭ Litovujo.

**Loren/o.** Regiono en orienta Francujo, okcidente de Alzaco, en kiu situas Vogezoj *2* kaj tri aliaj departementoj. Internacia landerokodaĵo: FR-54, FR-55, FR-57, FR-88.

**Losanĝeles/o.** Havenurbo en Usono, en la suda parto de Kalifornio.

**Lucern/o 1** Urbo en Svislando, ĉe la Lago de la Kvar Kantonoj. **2** Kantono de Svislando, kies ĉefurbo estas Lucerno *1*. Internacia landerokodaĵo: CH-LU.

**Luci/o.** Roma nomo. **Sankt/a Luci/o 1** Insulo en Malgrandaj Antiloj, norde de Sankta Vincento. **2** Lando situanta sur Sankta Lucio *1*. Internacia landokodaĵo: LC. **sankt/a/luci/an/o.** Ano de Sankta Lucio. **sankt/a/luci/a.** Rilata al sanktalucianoj, Sankta Lucio aŭ la kreola lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: acf), bazita sur la franca.

**Luksemburg/o 1** La ĉefurbo de Luksemburgo *2*. **2** Lando en okcidenta Eŭropo, situanta inter Belgujo, Francujo kaj Germanujo. Internacia landokodaĵo: LU. **3** Kantono de Luksemburgo *2*, en kiu situas Luksemburgo *1*. Internacia landerokodaĵo: LU-LU. **luksemburg/an/o.** Ano de Luksemburgo. **luksemburg/a.** Rilata al luksemburganoj, Luksemburgo aŭ la okcidentĝermana lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: ltz).

**Madagaskar/o 1** Granda insulo en la Hinda Oceano, oriente de Mozambiko. **2** Lando, kiu situas sur Madagaskaro *1*. Internacia landokodaĵo: MG.

**Madrid/o 1** La ĉefurbo de Hispanujo. **2** Regiono de Hispanujo, en kiu situas Madrido *1*. Internacia landerokodaĵo: ES-M.

**maja/o.** Ano de la indiĝena gento, kiu starigis inter la 3-a kaj la 16-a jarcentoj potencan regnon en meza Ameriko. **maja/a.** Rilata al majaoj aŭ la majaaj lingvoj. **maja/a/j lingv/o/j.** Familio de lingvoj, parolataj precipe en Gvatemalo, Meksiko, Belizo, Salvadoro kaj Honduro.

**Majenc/o.** Urbo en Germanujo, apud la kunfluejo de Rejno kaj Majno.

**Majn/o.** Rivero en Germanujo, la plej longa alfluanto de Rejno.

**Majot/o 1** Insularo en la sudorienta parto de Komoroj *1*. **2** Regiono kaj transmara departemento de Francujo, sur Majoto *1*. Internacia land(er)okodaĵo: YT, FR-976.

**makedon/o 1** Ano de Makedonujo *1*, parolanta hindeŭropan lingvon parencan al la antikva greka (internacia lingvokodaĵo: xmk). **2** Ano de la ĉefgento de Makedonujo *2*, parolanta sudslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: mkd). **3** Ano de Nord-Makedonujo. **Makedon/uj/o 1** Reĝlando norde de la antikva Grekujo, ĉe la Egea Maro; ĝi estis konkerita de la Roma Regno en la jaro 168 antaŭ nia erao. **2** Nuntempa regiono sur la Balkana Duoninsulo, kies ĉefaj partoj apartenas al Bulgarujo, Grekujo kaj Nord-Makedonujo, dum malpli grandaj partoj apartenas al Albanujo, Serbujo kaj Kosovo. **3** Parto de la nuntempa Grekujo, kiu dum antikveco apartenis al Makedonujo *1*, nun dividita inter tri regionoj: **Orient/a Makedon/uj/o kaj Trak/uj/o** (internacia landerokodaĵo: GR-A), **Centr/a Makedon/uj/o** (internacia landerokodaĵo: GR-B) kaj **Okcident/a Makedon/uj/o** (internacia landerokodaĵo: GR-C). **4** Iama federacia respubliko (1944-1991) de Jugoslavujo, sur la sama teritorio kiel la nuna Nord-Makedonujo. **Nord-Makedon/uj/o.** Lando sur la Balkana Duoninsulo, inter Albanujo kaj Bulgarujo, okupanta la nordokcidentan teritorion de Makedonujo *2*. Internacia landokodaĵo: MK. **makedon/a.** Rilata al makedonoj, la makedonaj lingvoj, Makedonujo aŭ Nord-Makedonujo.

**malaj/o.** Ano de gento, parolanta aŭstronezian lingvon (internacia lingvokodaĵo: msa) kaj loĝanta precipe en Malajzio kaj orienta Sumatro. **malaj/a.** Rilata al malajoj aŭ la malaja lingvo.

**Malajzi/o.** Federacia konstitucia monarĥio en sudorienta Azio, konsistanta el kontinenta parto kaj parto sur Borneo, disigitaj de la Sudĉina Maro. Internacia landokodaĵo: MY.

**Malavi/o.** Lando en sudorienta Afriko, inter Zambio, Tanzanio kaj Mozambiko. Internacia landokodaĵo: MW.

**Maldiv/o/j 1** Insularo en Sud-Azio, en la Hinda Oceano, ĉirkaŭ 600 kilometrojn sudokcidente de la suda pinto de la hinda subkontinento. **2** Lando, kiu okupas Maldivojn *1*. Internacia landokodaĵo: MV. **maldiv/an/o.** Ano de Maldivoj. **maldiv/a.** Rilata al maldivanoj, Maldivoj aŭ la sanskritida lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: div).

**Mali/o.** Lando en okcidenta Afriko, sudokcidente de Alĝerio. Internacia landokodaĵo: ML.

**Malt/o 1** Insulara lando en Mediteraneo, inter Sicilio kaj Nord-Afriko. Internacia landokodaĵo: MT. **2** La ĉefa insulo de Malto *1*. **malt/an/o.** Ano de Malto. **malt/a.** Rilata al maltanoj, Malto aŭ la ŝemida lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: mlt): *malta ordeno* (kavalira ordeno kristana).

**Manil/o.** La ĉefurbo de Filipinoj.

**mar/o** (FdE). **Arab/a Mar/o.** Randa maro inter Afriko kaj Barato, en la norda parto de la Hinda Oceano. **Balt/a Mar/o.** Interna maro en norda Eŭropo, formanta parton de Atlantiko kaj etendiĝanta inter Danujo kaj Finnlando. **Blank/a Mar/o.** Randa maro formanta parton de la Arkta Oceano, ĉe la nordokcidenta marbordo de Rusujo. **Ege/a Mar/o.** Parto de Mediteraneo, situanta inter Grekujo kaj Turkujo. **Filipin/a Mar/o.** Randa maro en la okcidenta parto de Pacifiko, oriente de Filipinoj. **Flav/a Mar/o.** Randa maro inter Ĉinujo kaj la Korea Duoninsulo, la nordokcidenta parto de la Orientĉina Maro. **Japan/a Mar/o.** Randa maro de Pacifiko, ĉirkaŭata de Japanujo, la Korea Duoninsulo kaj la orienta bordo de Rusujo. **Karib/a Mar/o.** Randa maro inter Sud-Ameriko, Centr-Ameriko kaj Antiloj. **Kaspi/a Mar/o.** Kaspio. **Koral/a Mar/o.** Randa maro de suda Pacifiko, ĉe la nordorienta marbordo de Aŭstralio. **Marmor/a Mar/o.** Interna maro en nordokcidenta Turkujo, inter la Egea Maro kaj la Nigra Maro. **Mort/a Mar/o.** Sala lago okcidente de Jordanio, en kiun fluas Jordano. **Nigr/a Mar/o.** Interna maro inter Eŭropo kaj Azio, oriente de la Balkana Duoninsulo kaj norde de Malgrand-Azio, ligita al Mediteraneo. **Nord/a Mar/o.** Parto de Atlantiko inter la nordokcidentaj bordoj de la eŭropa kontinento kaj Britujo. **Orient/ĉin/a Mar/o.** Maro en la okcidenta parto de Pacifiko, oriente de Ĉinujo. **Ruĝ/a Mar/o 1** Maro inter Afriko kaj la Araba Duoninsulo, etendiĝanta ĝis la Adena Golfo. **2** Gubernio de Egiptujo, en ties sudorienta parto, laŭlonge de la Ruĝa Maro *1*. Internacia landerokodaĵo: EG-BA. **3** Ŝtato de Sudano, en ties nordorienta parto, laŭlonge de la Ruĝa Maro *1*. Internacia landerokodaĵo: SD-RS. **Sargas/a Maro.** Parto de Atlantiko, ĉirkaŭata de oceanaj fluoj, kiun distingas ĝia aparta riĉeco je sargasoj kaj ĝia plej ofte kvieta surfaco kun aparte malhelblua koloro. **Sud/ĉin/a Mar/o.** Maro en la okcidenta parto de Pacifiko, sude de Ĉinujo.

**Maraton/o.** Urbo de Grekujo, fama pro la venko de Ateno super la Persa Imperio en la jaro 490 antaŭ nia erao. **maraton/o.** Vetkuro laŭ distanco de 42,195 kilometroj.

**Marsejl/o.** Havenurbo en suda Francujo, oriente de Montpeliero.

**Marŝal/o/j 1** Insularo en la orienta parto de Mikronezio *1*, norde de Nauro kaj oriente de Mikronezio *2*. **2** Lando, kiu okupas Marŝalojn *1*. Internacia landokodaĵo: MH. **marŝal/an/o.** Ano de Marŝaloj. **marŝal/a.** Rilata al marŝalanoj, Marŝaloj aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: mah).

**Martinik/o 1** Insulo en la mezo de Malgrandaj Antiloj, inter Dominiko kaj Sankta Lucio. **2** Regiono kaj transmara departemento de Francujo, sur Martiniko *1*. Internacia land(er)okodaĵo: MQ, FR-972. **martinik/an/o.** Ano de Martiniko. **martinik/a.** Rilata al martinikanoj, Martiniko aŭ la vario de la gvadelupa lingvo tie parolata.

**maŭr/o 1** Dum antikveco, nomo donata de la romanoj al la loĝantoj de la Maŭritania Regno en nordokcidenta Afriko. **2** Dum mezepoko, nomo donata de la eŭropanoj al la islamaj loĝantoj de nordokcidenta Afriko, la Ibera Duoninsulo, Sicilio kaj Malto: *maŭra arĥitekturo en Hispanujo*.

**Maŭrici/o 1** La ĉefa insulo en Maŭricio *2*. **2** Insulara lando en la Hinda Oceano, ĉirkaŭ 900 kilometrojn oriente de Madagaskaro. Internacia landokodaĵo: MU. **maŭrici/an/o.** Ano de Maŭricio. **maŭrici/a.** Rilata al maŭricianoj, Maŭricio aŭ la kreola lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: mfe), bazita sur la franca.

**Maŭritani/o.** Lando en Okcident-Afriko, nordoriente de Senegalo *2*. Internacia landokodaĵo: MR.

**Meksik/o** (8OA). **Nov-Meksik/o.** Usona ŝtato, okcidente de Teksaso kaj sude de Kolorado *2*, ĉe la suda parto de la Roka Montaro. Internacia landerokodaĵo: US-NM.

**Melanezi/o.** Parto de Oceanio, konsistanta el Nov-Gvineo kaj grupo de insularoj en okcidenta Pacifiko, sude de Mikronezio kaj okcidente de Polinezio.

**Mezopotami/o.** Historia regiono, kiu grandparte troviĝas inter Tigriso kaj Eŭfrato, hodiaŭ parto precipe de Irako.

**Mikronezi/o 1** Parto de Oceanio, konsistanta el grupo de insularoj en okcidenta Pacifiko, oriente de Filipinoj. **2** Insulara federacia lando en la sudokcidenta parto de Mikronezio *1*, nordoriente de Nov-Gvineo. Internacia landokodaĵo: FM.

**Milan/o.** Urbo en norda Italujo, inter Torino kaj Venecio.

**moldav/o 1** Ano de la ĉefgento de Moldavujo, parolanta la rumanan lingvon. **2** Ano de Moldavujo. **Moldav/uj/o.** Lando de orienta Eŭropo, inter Rumanujo kaj Ukrainujo. Internacia landokodaĵo: MD. **moldav/a.** Rilata al moldavoj, la moldava vario de la rumana lingvo aŭ Moldavujo.

**Monak/o 1** La ĉefurbo de Monako *2*. **2** Lando ĉe la orienta parto de la Lazura Bordo, proksime de la franc-itala landlimo. Internacia landokodaĵo: MC.

**mongol/o 1** Ano de la ĉefgento de Mongolujo, parolanta la mongolan lingvon (internacia lingvokodaĵo: mon). **2** Ano de Mongolujo. **Mongol/uj/o 1** Regiono en Azio, sude de Siberio, dividita inter Mongolujo *2*, Ĉinujo kaj Rusujo. **2** Lando en meza Azio, en la norda parto de Mongolujo *1*. Internacia landokodaĵo: MN. **mongol/a.** Rilata al mongoloj, al la mongola lingvo aŭ Mongolujo.

**mont/o** (FdE). **Blank/a Mont/o.** Monto ĉe la limo inter Francujo, Italujo kaj Svislando, la plej alta monto en Alpoj. **Rok/a Mont/ar/o.** Montaro en la okcidenta parto de Nord-Ameriko, kiu etendiĝas liniforme de okcidenta Kanado ĝis la sudokcidenta parto de Usono.

**Montenegr/o.** Lando en sudorienta Eŭropo, ĉe la adriatika flanko de la Balkana Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: ME. **montenegr/an/o.** Ano de Montenegro. **montenegr/a.** Rilata al montenegranoj, Montenegro aŭ la sudslava lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: cnr).

**Montevide/o 1** La ĉefurbo de Urugvajo. **2** Departemento en Urugvajo, en kiu situas Montevideo *1*. Internacia landerokodaĵo: UY-MO.

**Montpelier/o.** Urbo en suda Francujo, ĉe la mediteranea bordo de Okcitanujo *2*.

**Montreal/o.** Havenurbo en Kanado, en Kebekio.

**Moravi/o.** Orienta parto de Ĉeĥujo.

**Moskv/o.** La ĉefurbo de Rusujo, kaj inter la jaroj 1922 kaj 1991 de Sovet-Unio.

**Mozambik/o.** Lando en sudorienta Afriko, sude de Tanzanio. Internacia landokodaĵo: MZ.

**Mumbaj/o.** Havenurbo ĉe la okcidenta marbordo de Barato.

**Munken/o.** Urbo en suda Germanujo, la ĉefurbo de la federacia lando Bavarujo.

**Nagasak/o 1** Havenurbo en Japanujo, trafita de usona atombombo tri tagojn post Hiroŝimo. **2** Gubernio de Japanujo, kies ĉefurbo estas Nagasako *1*. Internacia landerokodaĵo: JP-42.

**Namibi/o.** Lando en la okcidento de suda Afriko. Internacia landokodaĵo: NA.

**Napol/o.** Urbo en la okcidenta parto de suda Italujo. **napol/an/o.** Ano de Napolo. **napol/a.** Rilata al napolanoj, Napolo aŭ la vario de la itala lingvo parolata en la suda parto de la itala ĉeftero (internacia lingvokodaĵo: nap).

**Naur/o 1** Insulo en la nordorienta parto de Melanezio, sude de Marŝaloj kaj norde de Vanuatuo. **2** Lando sur Nauro *1*. Internacia landokodaĵo: NR. **naur/an/o.** Ano de Nauro. **naur/a.** Rilata al nauranoj, Nauro aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: nau).

**Nepal/o.** Lando en Azio, inter Barato kaj Tibeto. Internacia landokodaĵo: NP. **nepal/an/o.** Ano de Nepalo. **nepal/a.** Rilata al nepalanoj, Nepalo aŭ la sanskritida lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: nep).

**Nevis/o 1** Insulo de Sankta Kristoforo kaj Neviso, ĉirkaŭ 3 kilometrojn sudoriente de Sankta Kristoforo. **2** Ŝtato de Sankta Kristoforo kaj Neviso, sur Neviso *1*. Internacia landerokodaĵo: KN-N.

**Niĝer/o 1** Granda rivero en Okcident-Afriko, kiu fluas de sudorienta Gvineo tra Malio kaj Niĝero, laŭlonge de ties limo kun Benino, ĝis Niĝerio, kie ĝi enfluas la Gvinean Golfon. **2** Lando en Okcident-Afriko, sudoriente de Alĝerio. Internacia landokodaĵo: NE. **3** Ŝtato de Niĝerio, en ties okcidenta parto, tra kiu fluas Niĝero *1*. Internacia landerokodaĵo: NG-NI.

**Niĝeri/o.** Lando en Okcident-Afriko, ĉe la Gvinea Golfo. Internacia landokodaĵo: NG.

**Nil/o.** Rivero en orienta Afriko, la plej longa en Afriko, kiu post la kunfluo de Blanka Nilo kaj Blua Nilo en Sudano fluas ĝis Egiptujo, kie ĝi enfluas Mediteraneon. **Blank/a Nil/o 1** Alfluanto de Nilo, kiu fluas de Ugando tra Sud-Sudano ĝis Sudano, kie ĝi kunfluas kun Blua Nilo. **2** Ŝtato de Sudano, en ties suda parto, nordokcidente de Blua Nilo *2*. Internacia landerokodaĵo: SD-NW. **Blu/a Nil/o 1** Alfluanto de Nilo, kiu fluas de norda Etiopujo ĝis Sudano, kie ĝi kunfluas kun Blanka Nilo. **2** Ŝtato de Sudano, en ties sudorienta parto. Internacia landerokodaĵo: SD-NB.

**Nurenberg/o.** Urbo en Germanujo, en la federacia lando Bavarujo.

**ocean/o** (1OA). **Arkt/a Ocean/o.** Oceano norde de Nord-Ameriko, Eŭropo kaj Azio, en kiu situas la Norda Poluso. **Hind/a Ocean/o.** Oceano ĉirkaŭata de Afriko, Azio, Aŭstralio kaj la Suda Oceano. **Sud/a Ocean/o.** Oceano ĉirkaŭanta Antarkton kaj situanta en la regiono kun pli ol 60-grada suda latitudo.

**Oceani/o.** Mondoparto konsistanta el Aŭstralio kaj la ĉirkaŭantaj insuloj.

**Odes/o 1** Urbo en Ukrainujo, ĉe la Nigra Maro. **2** Regiono en sudokcidenta Ukrainujo, kiu entenas Odeson *1*. Internacia landerokodaĵo: UA-51.

**Odr/o.** Rivero, kiu fluas de Ĉeĥujo tra Pollando, kie ĝi formas parton de ties landlimo kun Germanujo, ĝis ĝi enfluas la Baltan Maron.

**okcitan/o.** Ano de Okcitanujo *1*, precipe se portanto de la okcitana kulturo kaj parolanto de ties okcitanlatinida lingvo (internacia lingvokodaĵo: oci). **Okcitan/uj/o 1** Partoj de suda Francujo, nordorienta Hispanujo kaj nordokcidenta Italujo, en kiuj estas aŭ estis parolataj dialektoj de la okcitana lingvo. **2** Regiono en suda Francujo, ĉe Pireneoj kaj apud Mediteraneo. Internacia landerokodaĵo: FR-OCC. **okcitan/a.** Rilata al okcitanoj, la okcitana lingvo aŭ Okcitanujo.

**Okinav/o 1** Insulo de Japanujo, inter la Orientĉina Maro kaj Pacifiko. **2** Gubernio de Japanujo, konsistanta el Okinavo *1* kaj kelkaj el la pli malgrandaj insuloj inter la japana ĉeftero kaj Tajvano *1*. Internacia landerokodaĵo: JP-47. **okinav/an/o.** Ano de Okinavo. **okinav/a.** Rilata al okinavanoj, Okinavo aŭ la lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: ryu), parenca al la japana.

**Oksford/o.** Universitata urbo en Anglujo, nordokcidente de Londono.

**Olimp/o.** La plej alta monto en Grekujo, laŭ la mitologio la restadejo de la antikvaj grekaj dioj.

**Olimpi/o.** Urbo en Grekujo, kie okazis la unuaj Olimpiaj ludoj. **Olimpi/a/j lud/o/j 1** Sportkonkursoj, okazintaj en Olimpio dum antikveco. **2** Internaciaj sportkonkursoj, okazantaj ĉiun kvaran jaron ekde 1896 en malsamaj landoj.

**Oman/o.** Lando en la sudorienta parto de la Araba Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: OM.

**Osak/o 1** Havenurbo en Japanujo, sudokcidente de Kioto. **2** Gubernio de Japanujo, kies ĉefurbo estas Osako *1*. Internacia landerokodaĵo: JP-27.

**Osl/o 1** La ĉefurbo de Norvegujo. **2** Distrikto de Norvegujo, en kiu situas Oslo *1*. Internacia landerokodaĵo: NO-03.

**otoman/o.** Ano de unu branĉo el la turka popolo, kiu kreis la Otomanan Imperion. **otoman/a.** Rilata al otomanoj aŭ la Otomana Imperio.

**Palaŭ/o.** Insulara lando en la sudokcidenta parto de Mikronezio *1*, okcidente de Mikronezio *2*. Internacia landokodaĵo: PW. **palaŭ/an/o.** Ano de Palaŭo. **palaŭ/a.** Rilata al palaŭanoj, Palaŭo aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: pau).

**Palestin/o 1** Lando en okcidenta Azio, sude de Libano. Internacia landokodaĵo: PS. **2** Historia lando, kie troviĝas nun Israelo kaj Palestino *1*.

**Papu/o.** Provinco de Indonezio, en la nordokcidenta parto de Nov-Gvineo. Internacia landerokodaĵo: ID-PA. **Papu/o-Nov-Gvine/o.** Lando en la orienta parto de Nov-Gvineo. Internacia landokodaĵo: PG. **papu/a/j lingv/o/j.** Grupo de lingvoj parolataj en Nov-Gvineo, kiuj estas nek aŭstroneziaj, nek aŭstraliaj.

**Parnas/o.** Monto en Grekujo, laŭ la mitologio la restadejo de Apolono kaj la muzoj.

**Pekin/o.** La ĉefurbo de Ĉinujo.

**Pensilvani/o.** Usona ŝtato, en la nordorienta parto de Usono, sude kaj sudokcidente de Nov-Jorko *1*.

**pers/o.** Ano de la ĉefgento de Persujo, parolanta iranan lingvon (internacia lingvokodaĵo: fas). **Pers/uj/o.** Alia nomo por Irano, uzata de okcidentanoj, precipe antaŭ la jaro 1935. **pers/a.** Rilata al persoj, la persa lingvo aŭ Persujo.

**Peterburg/o, Sankt-Peterburg/o.** Havenurbo en Rusujo, ĉe la Balta Maro.

**Pirene/o/j.** Montoĉeno inter Hispanujo kaj Francujo. **Alt/a/j Pirene/o/j.** Departemento en Francujo, oriente de Atlantikaj Pireneoj. Internacia landerokodaĵo: FR-65. **Atlantik/a/j Pirene/o/j.** Departemento en Francujo, en ties sudokcidenta ekstremaĵo. Internacia landerokodaĵo: FR-64. **Orient/a/j Pirene/o/j.** Departemento en Francujo, ĉe la sudokcidenta parto de ties mediteranea marbordo. Internacia landerokodaĵo: FR-66.

**portugal/o 1** Ano de la ĉefgento de Portugalujo, parolanta iberolatinidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: por). **2** Ano de Portugalujo. **Portugal/uj/o.** Lando en sudokcidenta Eŭropo, okcidente de Hispanujo, ĉe Atlantiko. Internacia landokodaĵo: PT. **portugal/a.** Rilata al portugaloj, la portugala lingvo aŭ Portugalujo.

**Prag/o.** La ĉefurbo de Ĉeĥujo, kaj antaŭe de Bohemujo kaj de Ĉeĥoslovakujo.

**Principe/o.** Insulo de Santomeo kaj Principeo, ĉirkaŭ 150 kilometrojn nordoriente de Santomeo *1*.

**prus/o 1** Ano de la ĉefgento de Prusujo, parolinta dum mezepoko baltan lingvon (internacia lingvokodaĵo: prg) kaj poste la germanan lingvon. **2** Ano de Prusujo. **Prus/uj/o.** Iama germana reĝlando, sude de la Balta Maro, kiu iom post iom aneksis grandan parton de Germanujo ĝis Rejno; malfondita en la jaro 1947. **prus/a.** Rilata al prusoj aŭ Prusujo.

**Raŭm/o.** Urbo ĉe la okcidenta bordo de Finnlando.

**regn/o** (FdE). **Hungar/a Regn/o.** Reĝlando en Mez-Eŭropo ekzistanta inter la jaroj 1000 kaj 1918, precipe sur la teritorio de la nuna Hungarujo. **Rom/a Regn/o.** Regno regata de Romo ekde la 8-a jarcento antaŭ nia erao, kiu en la 4-a jarcento de nia erao dispartiĝis en okcidentan regnon, regatan de Romo ĝis ties falo en la jaro 476, kaj orientan regnon, regatan de Konstantinopolo, kiu regno plu ekzistis en la formo de la Bizanca Imperio ĝis ties falo en la jaro 1453.

**Rejkjavik/o.** La ĉefurbo de Islando.

**Rejn/o.** Rivero, kiu fluas de Svislando tra Germanujo ĝis Nederlando, kie ĝi enfluas la Nordan Maron. **Supr/a Rejn/o.** Departemento en Francujo, formanta la sudan parton de Alzaco. Internacia landerokodaĵo: FR-68. **Mal/supr/a Rejn/o.** Departemento en Francujo, formanta la nordan parton de Alzaco. Internacia landerokodaĵo: FR-67.

**Reuni/o 1** Insulo en la okcidenta parto de la Hinda Oceano, inter Maŭricio kaj Madagaskaro. **2** Regiono kaj transmara departemento de Francujo, sur Reunio *1*. Internacia land(er)okodaĵo: RE, FR-974. **reuni/an/o.** Ano de Reunio. **reuni/a.** Rilata al reunianoj, Reunio aŭ la kreola lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: rcf), bazita sur la franca.

**Riodeĵanejr/o 1** Havenurbo en la sudorienta parto de Brazilo, ĉe Atlantiko. **2** Brazila ŝtato, kies ĉefurbo estas Riodeĵanejro *1*. Internacia landerokodaĵo: BR-RJ.

**Rom/o.** La ĉefurbo de Italujo kaj de la antikva Roma Regno.

**romanĉ/o 1** Ano de la ĉefgento de Romanĉujo, parolanta latinidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: roh). **2** Ano de Romanĉujo. **Romanĉ/uj/o.** Parto de sudorienta Svislando, precipe Grizono, kaj nordorienta Italujo, precipe Friulo, kie loĝas la romanĉoj. **romanĉ/a.** Rilata al romanĉoj, la romanĉa lingvo aŭ Romanĉujo.

**Roterdam/o.** Havenurbo en Nederlando, en Sud-Holando.

**Ruand/o.** Lando en orienta Afriko, inter Ugando kaj Burundo. Internacia landokodaĵo: RW.

**Sahar/o.** Granda dezerto en norda Afriko, etendiĝanta de Atlantiko ĝis la Ruĝa Maro.

**saks/o 1** Ano de ĝermana tribo, loĝanta precipe en Saksujo *1*; parto de tiu tribo konkeris Anglujon en la 5-a jarcento. **2** Ano de Saksujo *2*. **Saks/uj/o 1** Iama duklando kaj reĝlando, situanta en tiu nordokcidenta parto de Germanujo, kiu pli-malpli respondas al la nuna Malsupra Saksujo. **2** Germana federacia lando situanta en orienta Germanujo, apud la limoj kun Pollando kaj Ĉeĥujo. Internacia landerokodaĵo: DE-SN. **Mal/supr/a Saks/uj/o.** Germana federacia lando situanta en nordokcidenta Germanujo, apud la Norda Maro. Internacia landerokodaĵo: DE-NI.

**Salomon/o/j 1** Insularo en la norda parto de Melanezio, oriente de Papuo-Nov-Gvineo kaj nordokcidente de Vanuatuo. **2** Lando, kiu okupas la sudorientan parton de Salomonoj *1*. Internacia landokodaĵo: SB.

**Salvador/o.** Lando en Centr-Ameriko, ĉe Pacifiko, sudokcidente de Honduro. Internacia landokodaĵo: SV.

**Samarkand/o 1** Urbo en orienta Uzbekujo, ĉirkaŭ 50 kilometrojn okcidente de ties limo kun Taĝikujo. **2** Regiono de Uzbekujo, kiu entenas Samarkandon *1*. Internacia landerokodaĵo: UZ-SA.

**Samo/o.** Insulara lando en la okcidenta parto de Polinezio, inter Nov-Zelando kaj Havajo. Internacia landokodaĵo: WS. **samo/an/o.** Ano de Samoo. **samo/a.** Rilata al samoanoj, Samoo aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: smo).

**Sanfrancisk/o.** Havenurbo en Usono, en la norda parto de Kalifornio.

**Sanmarin/o 1** La ĉefurbo de Sanmarino *2*. **2** Lando tute ĉirkaŭata de Italujo, oriente de Florenco. Internacia landokodaĵo: SM.

**Sanpaŭl/o 1** La ĉefurbo de Sanpaŭlo *2*. **2** Brazila ŝtato, situanta en sudorienta Brazilo. Internacia landerokodaĵo: BR-SP.

**Sanskrit/o 1** Lingvo kodigita de la gramatikisto *Pāṇini* ĉirkaŭ la 4-a jarcento antaŭ nia erao kaj funkciinta kiel norma kultura lingvo en la antikva kaj mezepoka Hindujo. Internacia lingvokodaĵo: san. **2** Unu el la lingvoj parolataj en la antikva Hindujo, kies parolantoj povis reciproke kompreni sin, kaj sur kiuj baziĝis la kodigo de Sanskrito *1*: *la epopeoj ekzemplas la "epopean Sanskriton"*. **sanskrit/a.** Rilata al Sanskrito: *la sanskrita* (lingvo). **sanskrit/id/a/j lingv/o/j.** Lingvoj devenintaj el Sanskrito *2*.

**Santiag/o 1** La ĉefurbo de Ĉilio (**Santiag/o de Ĉili/o**). **2** Granda urbo ĉe la sudorienta marbordo de Kubo (**Santiag/o de Kub/o**). **3** Provinco de Kubo, en kiu situas Santiago *2*. Internacia landerokodaĵo: CU-13.

**Santome/o 1** La ĉefa insulo de Santomeo kaj Principeo, ĉirkaŭ 250 kilometrojn okcidente de Gabono, ĉe la ekvatoro. **2** La ĉefurbo de Santomeo kaj Principeo, sur Santomeo *1*. **Santome/o kaj Principe/o.** Insulara lando en la Gvinea Golfo, konsistanta precipe el Santomeo *1* kaj la pli malgranda insulo Principeo. Internacia landokodaĵo: ST.

**Sapf/o.** Poetino el antikva Grekujo (6-a jarcento antaŭ nia erao).

**Sarajev/o 1** La ĉefurbo de Bosnujo kaj Hercegovino. **2** Kantono de Bosnujo kaj Hercegovino, en kiu situas Sarajevo *1*. Internacia landerokodaĵo: BA-09.

**sargas/o.** Genro de maralgoj el la klaso brunalgoj. (*Sargassum*.)

**Saud/o.** Familinomo de anoj de araba reĝa dinastio, kiu regas Saudan Arabujon. **Saud/a Arab/uj/o.** Lando inter la Ruĝa Maro kaj la Persa Golfo, kiu kovras la plej grandan parton de la Araba Duoninsulo. Internacia landokodaĵo: SA. **saud/arab/uj/an/o.** Ano de Sauda Arabujo. **saud/a.** Rilata al Saudo, saudarabujanoj aŭ Sauda Arabujo.

**Sejŝel/o/j.** Insulara lando en la Hinda Oceano, ĉirkaŭ 1300 kilometrojn sudoriente de Somalio. Internacia landokodaĵo: SC.

**Senegal/o 1** Rivero en Okcident-Afriko, kiu fluas de Gvineo tra Malio, formas la limon inter Senegalo *2* kaj Maŭritanio, kaj fine enfluas Atlantikon. **2** Lando en Okcident-Afriko, sudokcidente de Malio. Internacia landokodaĵo: SN.

**serb/o 1** Ano de la ĉefgento de Serbujo, parolanta sudslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: srp). **2** Ano de Serbujo. **Serb/uj/o.** Lando sur la Balkana Duoninsulo, inter Bosnujo kaj Hercegovino kaj Rumanujo. Internacia landokodaĵo: RS. **serb/a.** Rilata al serboj, la serba lingvo aŭ Serbujo.

**Seul/o.** La ĉefurbo de Sud-Koreujo.

**Siberi/o.** Parto de Azio, etendiĝanta de Uralo ĝis Pacifiko, norde de la vasta montaro kaj dezertaro de meza Azio.

**Sicili/o 1** Insulo de Italujo, sude de la itala duoninsulo. **2** Regiono de Italujo, situanta sur Sicilio *1*. Internacia landerokodaĵo: IT-82. **sicili/an/o.** Ano de Sicilio. **sicili/a.** Rilata al sicilianoj, Sicilio aŭ la vario de la itala lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: scn).

**Sieraleon/o.** Lando en Okcident-Afriko, inter Gvineo kaj Liberio. Internacia landokodaĵo: SL.

**Silezi/o 1** Regiono en Mez-Eŭropo, kies plej granda parto apartenas al Pollando. **2** Provinco de Pollando, en ties suda parto. Internacia landerokodaĵo: PL-24. **silezi/an/o.** Ano de Silezio. **silezi/a.** Rilata al silezianoj, Silezio aŭ la okcidentslava lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: szl). **Mal/supr/a Silezi/o.** Provinco de Pollando, en ties sudokcidenta parto. Internacia landerokodaĵo: PL-02.

**Singapur/o 1** La ĉefurbo de Singapuro *2*. **2** Lando sude de Malajzio. Internacia landokodaĵo: SG.

**skandinav/o 1** Ano de unu el la nordĝermanaj gentoj de Skandinavujo. **2** Ano de Skandinavujo. **Skandinav/uj/o 1** Duoninsulo en norda Eŭropo, ampleksanta Norvegujon, Svedujon kaj nordokcidentan Finnlandon. **2** Regiono en norda Eŭropo ampleksanta, krom Norvegujo kaj Svedujo, Danujon; iafoje ankaŭ Finnlando kaj Islando estas enkalkulataj. **skandinav/a.** Rilata al skandinavoj: *la skandinavaj lingvoj* (parolataj en Islando, Svedujo, Norvegujo kaj Danujo).

**skot/o 1** Ano de la ĉefgento de Skotlando. **2** Ano de Skotlando. **Skot/land/o.** Lando en Britujo, norde de Anglujo. Internacia landerokodaĵo: GB-SCT. **skot/a.** Rilata al skotoj, ilia okcidentĝermana lingvo aŭ Skotlando: *skota lingvo* (okcidentĝermana lingvo, internacia lingvokodaĵo: sco); *skota skolo de Esperanta literaturo*; *en la nordo kaj okcidento [de Skotlando] oni parolis la lingvon gaelan, [dum] en la centro kaj nordoriento oni parolis skote* (Auld).

**slav/o.** Ano de eŭropa gentaro, kiu karakteriziĝas per uzado de parencaj lingvoj, kaj al kiu apartenas la gentoj belorusoj, bulgaroj, ĉeĥoj, kroatoj, poloj, rusoj, serboj, slovenoj, slovakoj, ukrainoj kaj aliaj. **slav/a.** Rilata al slavoj aŭ slavaj lingvoj.

**slovak/o 1** Ano de la ĉefgento de Slovakujo, parolanta okcidentslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: slk). **2** Ano de Slovakujo. **Slovak/uj/o.** Lando en Mez-Eŭropo, inter Pollando kaj Hungarujo. Internacia landokodaĵo: SK. **slovak/a.** Rilata al slovakoj, la slovaka lingvo aŭ Slovakujo. **ĉeĥo/slovak/o.** Ano de Ĉeĥoslovakujo. **Ĉeĥ/o/slovak/uj/o.** Inter la jaroj 1918 kaj 1992, lando konsistanta el Ĉeĥujo kaj Slovakujo. **ĉeĥ/o/slovak/a.** Rilata al Ĉeĥoslovakujo.

**sloven/o 1** Ano de la ĉefgento de Slovenujo, parolanta sudslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: slv). **2** Ano de Slovenujo. **Sloven/uj/o.** Lando en Mez-Eŭropo, inter Aŭstrujo kaj Kroatujo. Internacia landokodaĵo: SI. **sloven/a.** Rilata al slovenoj, la slovena lingvo aŭ Slovenujo.

**Sofi/o 1** La ĉefurbo de Bulgarujo. **2** Provinco de Bulgarujo, en ties okcidenta parto, kies administra centro estas Sofio *1*. Internacia landerokodaĵo: BG-23. **Sofi/o-Urb/o.** Provinco de Bulgarujo, kiu entenas Sofion *1*, preskaŭ tute ĉirkaŭata de Sofio *2* sed ne parto de tiu ĉi. Internacia landerokodaĵo: BG-22.

**somal/o 1** Ano de la ĉefgento de Somalujo, parolanta afrikazian lingvon (internacia lingvokodaĵo: som). **2** Ano de Somalujo. **Somal/uj/o.** Lando en orienta Afriko, nordoriente de Kenjo *2*. Internacia landokodaĵo: SO. **somal/a.** Rilata al somaloj, la somala lingvo aŭ Somalujo.

**sovet/o 1** Dum la revoluciaj tempoj en Rusujo (la jaroj 1905 kaj 1917), konsilantaro de elektitaj deputitoj, kutime konsistanta el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiu funkciis kiel organo de popola memregado ekde loka ĝis regiona nivelo. **2** En Soveta Unio, reprezenta organo kun leĝofara kaj decida povo ekde vilaĝa kaj urbodistrikta ĝis ŝtata nivelo. **sovet/a.** Rilata al sovetoj, politika sistemo asociita kun sovetoj, al Soveta Unio kaj ties loĝantoj, precipe en la kunteksto de la koncerna politika reĝimo. **Sovet/a Uni/o, Sovet-Uni/o.** Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj; iama federacia regno, ekzistanta inter la jaroj 1922 kaj 1991, kiu de 1956 ĝis sia dismembriĝo konsistis el 15 respublikoj, respondaj al la nunaj landoj Armenujo, Azerbajĝano, Belorusujo, Estonujo, Kartvelujo, Kazaĥujo, Kirgizujo, Latvujo, Litovujo, Moldavujo, Rusujo, Taĝikujo, Turkmenujo, Ukrainujo kaj Uzbekujo.

**Soveti/o** = Soveta Unio. **soveti/a.** Rilata al Sovetio kaj ties loĝantoj.

**Srilank/o 1** Insulo en Sud-Azio, en la Hinda Oceano, sudokcidente de la Bengala Golfo, ĉirkaŭ 200 kilometojn oriente de la suda pinto de la hinda subkontinento. **2** Lando sur Srilanko *1*. Internacia landokodaĵo: LK.

**status/o.** Leĝa aŭ jura situacio de persono, organizo, regiono, lingvo k.s.

**Stokholm/o.** La ĉefurbo de Svedujo.

**Strasburg/o.** Urbo en orienta Francujo, la ĉefurbo de Malsupra Rejno.

**Sudan/o** (8OA). **Sud-Sudan/o.** Lando en meza Afriko, inter Centr-Afriko kaj Etiopujo. Internacia landokodaĵo: SS.

**Sumatr/o.** Insulo de Indonezio, situanta rande de la Hinda Oceano ambaŭflanke de la ekvatoro.

**Sumer/o.** Dum antikveco, regno de Mezopotamio, sudoriente de Babilono. **sumer/an/o.** Ano de la antikva ĉefgento de Sumero, parolanta la sumeran lingvon (internacia lingvokodaĵo: sux). **sumer/a.** Rilata al sumeranoj, ilia lingvo aŭ Sumero.

**Surinam/o.** Lando en la nordorienta parto de Sud-Ameriko, inter Gujano kaj Franca Gujano. Internacia landokodaĵo: SR.

**suveren/o.** Tiu, kiu en regno havas la plej superan povon.

**svazi/o 1** Ano de la ĉefgento de Svazilando, parolanta bantuan lingvon (internacia lingvokodaĵo: ssw). **2** Ano de Svazilando. **Svazi/land/o.** Lando en suda Afriko, inter Sud-Afriko kaj Mozambiko. Internacia landokodaĵo: SZ. **svazi/a.** Rilata al svazioj, la svazia lingvo aŭ Svazilando.

**svis/o.** Ano de Svislando. **Svis/land/o, Svis/uj/o.** Federacia regno en Mez-Eŭropo, okcidente de Aŭstrujo. Internacia landokodaĵo: CH. **svis/a.** Rilata al svisoj aŭ Svislando.

**Ŝanhaj/o 1** Havenurbo ĉe la Orientĉina Maro, ĉefurbo de Ŝanhajo *2*. **2** Distrikto en orienta Ĉinujo, en kiu situas Ŝanhajo *1*. Internacia landerokodaĵo: CN-SH.

**Ŝem/o.** Unu el la filoj de *Noa*, laŭ la sanktaj tekstoj de kristanoj, hebreoj kaj islamanoj. **ŝem/id/o.** Ano de kiu ajn el la gentoj, supozataj deveni de Ŝemo. **ŝem/id/a.** Rilata al ŝemidoj aŭ ŝemidaj lingvoj.

**ŝem/id/a/j lingv/o/j.** Branĉo de la afrikazia lingvaro, parolata precipe en okcidenta Azio, norda kaj okcidenta Afriko kaj Malto.

**Ŝetland/o.** Insularo de Skotlando, ĉirkaŭ 170 kilometrojn nordoriente de la ĉeftero. Internacia landerokodaĵo: GB-ZET.

**taĝik/o 1** Ano de la ĉefgento de Taĝikujo, parolanta iranan lingvon (internacia lingvokodaĵo: tgk). **2** Ano de Taĝikujo. **Taĝik/uj/o.** Lando en meza Azio, inter Afganujo kaj Kirgizujo. Internacia landokodaĵo: TJ. **taĝik/a.** Rilata al taĝikoj, la taĝika lingvo aŭ Taĝikujo.

**taj/o 1** Ano de la ĉefgento de Tajlando, parolanta la tajan lingvon (internacia lingvokodaĵo: tha). **2** Ano de Tajlando. **Taj/land/o.** Lando en Hindoĉinujo, inter Birmo kaj Kamboĝo. Internacia landokodaĵo: TH. **taj/a.** Rilata al tajoj, la taja lingvo aŭ Tajlando.

**Tajvan/o 1** Insulo situanta sudoriente de kontinenta Ĉinujo. **2** Lando situanta sur Tajvano *1*. Internacia landokodaĵo: TW.

**tamil/o 1** Ano de la ĉefgento de Tamillando, parolanta dravidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: tam). **2** Ano de Tamillando. **Tamil/land/o.** Barata ŝtato, en la sudorienta parto de Barato. Internacia landerokodaĵo: IN-TN. **tamil/a.** Rilata al tamiloj, la tamila lingvo aŭ Tamillando.

**Tamiz/o.** Rivero en Anglujo, kiu trafluas Londonon.

**Tampere/o.** Landinterna urbo en sudokcidenta Finnlando.

**Tanzani/o.** Lando en orienta Afriko, sude de Kenjo. Internacia landokodaĵo: TZ.

**Tasmani/o.** Insula ŝtato de Aŭstralio, ĉirkaŭ 240 kilometrojn sude de la orienta parto de la aŭstralia ĉeftero. Internacia landerokodaĵo: AU-TAS.

**tatar/o.** Ano de iu el pluraj gentoj, loĝantaj precipe en Tatarujo, Krimeo kaj okcidenta Siberio, parolantaj tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: tat). **Tatar/uj/o.** Respubliko en la Rusuja Federacio, ĉe Volgo, oriente de Ĉuvaŝujo. Internacia landerokodaĵo: RU-TA. Nacia landerokodaĵo: 16. **tatar/a.** Rilata al tataroj, la tatara lingvo aŭ Tatarujo.

**Teheran/o 1** La ĉefurbo de Irano. **2** Provinco de Irano, en kiu situas Teherano *1*. Internacia landerokodaĵo: IR-23.

**Teksas/o.** Usona ŝtato, en la meza parto de suda Usono. Internacia landerokodaĵo: US-TX.

**Telaviv/o 1** Urbo en Israelo, ĉe Mediteraneo. **2** Distrikto de Israelo, kies ĉefurbo estas Telavivo *1*. Internacia landerokodaĵo: IL-TA.

**Tibet/o.** Lando en meza Azio, de la jaro 1950 sub regado de Ĉinujo. **tibet/an/o.** Ano de Tibeto. **tibet/a.** Rilata al tibetanoj, Tibeto aŭ al pluraj lingvoj tie parolataj (internaciaj lingvokodaĵoj: adx, bod, khg).

**Tigris/o.** Rivero en orienta Mezopotamio, kiu fluas de Turkujo kaj laŭlonge de ties limo kun Sirio ĝis Irako, kie ĝi kunfluas kun Eŭfrato.

**Timor/o.** Insulo norde de Aŭstralio. **Okcident/a Timor/o.** Okcidenta parto de Timoro, kiu apartenas al Indonezio. **Orient/a Timor/o.** Lando en la orienta parto de Timoro. Internacia landokodaĵo: TL.

**tjurk/o.** Ano de unu el la multaj triboj, origine loĝantaj en norda Ĉinujo, kiuj poste disvastiĝis ankaŭ en Mongolujon, Siberion, kaspiajn ĉirkaŭaĵojn kaj ĝis la Balkana Duoninsulo, interalie azerbajĝananoj, baŝkiroj, kazaĥoj, kirgizoj, tataroj, turkoj, turkmenoj, ujguroj kaj uzbekoj. **tjurk/a.** Rilata al tjurkoj kaj tjurkaj lingvoj.

**Tobag/o.** Insulo de Trinidado kaj Tobago, ĉirkaŭ 35 kilometrojn nordoriente de Trinidado.

**Tog/o.** Lago en la suda parto de Togolando, apud la Gvinea Golfo. **Tog/o/land/o.** Lando en Okcident-Afriko, inter Ganao kaj Benino. Internacia landokodaĵo: TG.

**Toki/o 1** La ĉefurbo de Japanujo. **2** Gubernio de Japanujo, kie situas Tokio *1*. Internacia landerokodaĵo: JP-13.

**Tong/o.** Insulara lando en la okcidenta parto de Polinezio, sudokcidente de Samoo. Internacia landokodaĵo: TO. **tong/an/o.** Ano de Tongo. **tong/a.** Rilata al tonganoj, Tongo aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: ton).

**Torin/o.** Urbo en la okcidenta parto de norda Italujo.

**Toront/o.** Urbo en Kanado, ĉe la Grandaj Lagoj.

**trak/o.** Ano de gento, kiu dum antikveco loĝis en Trakujo *1*. **Trak/uj/o 1** Antikva reĝlando ĉe la okcidenta bordo de la Nigra Maro kaj la norda bordo de la Egea Maro, kiu iĝis provinco de la Roma

Imperio en la jaro 46. **2** Nuntempa regiono en sudorienta Eŭropo, dividita inter Bulgarujo, Grekujo kaj Turkujo.

**Trinidad/o.** La plej suda insulo en Malgrandaj Antiloj kaj ĉefa insulo de Trinidado kaj Tobago. **Trinidad/o kaj Tobag/o.** Insulara lando en la suda parto de Malgrandaj Antiloj, ĉe la nordorienta bordo de Venezuelo. Internacia landokodaĵo: TT.

**turkmen/o 1** Ano de la ĉefgento de Turkmenujo, parolanta tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: tuk). **2** Ano de Turkmenujo. **Turkmen/uj/o.** Lando en meza Azio, norde de Irano kaj Afganujo. Internacia landokodaĵo: TM. **turkmen/a.** Rilata al turkmenoj, la turkmena lingvo aŭ Turkmenujo.

**Tuval/o.** Insulara lando en la okcidenta parto de Polinezio, inter Kiribato kaj Samoo. Internacia landokodaĵo: TV. **tuval/an/o.** Ano de Tuvalo. **tuval/a.** Rilata al tuvalanoj, Tuvalo aŭ la aŭstronezia lingvo tie parolata (internacia lingvokodaĵo: tvl).

**Ugand/o.** Lando en orienta Afriko, inter Sud-Sudano kaj Tanzanio. Internacia landokodaĵo: UG.

**ujgur/o.** Ano de gento loĝanta en meza Azio, precipe en Ĉinujo norde de Tibeto, parolanta tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: uig). **ujgur/a.** Rilata al ujguroj aŭ la ujgura lingvo.

**ukrain/o 1** Ano de la ĉefgento de Ukrainujo, parolanta orientslavan lingvon (internacia lingvokodaĵo: ukr). **2** Ano de Ukrainujo. **Ukrain/uj/o.** Lando en orienta Eŭropo, norde de la Nigra Maro. Internacia landokodaĵo: UA. **ukrain/a.** Rilata al ukrainoj, la ukraina lingvo aŭ Ukrainujo.

**Ulanbator/o.** La ĉefurbo de Mongolujo.

**Upsal/o.** Universitata urbo en Svedujo, norde de Stokholmo.

**Ural/o 1** Montaro inter Eŭropo kaj Azio, de la Arkta Oceano ĝis Uralo *2*. **2** Rivero inter Rusujo kaj Kazaĥujo, fluanta de Uralo *1* en Kaspion. **ural/a/j lingv/oj.** Familio, al kiu apartenas ekzemple la lingvoj hungara, finna kaj estona.

**uzbek/o 1** Ano de la ĉefgento de Uzbekujo, parolanta tjurkan lingvon (internacia lingvokodaĵo: uzb). **2** Ano de Uzbekujo. **Uzbek/uj/o.** Lando en meza Azio, inter Turkmenujo kaj Kazaĥujo. Internacia landokodaĵo: UZ. **uzbek/a.** Rilata al uzbekoj, la uzbeka lingvo aŭ Uzbekujo.

**Valenci/o 1** Urbo ĉe la mediteranea bordo de Hispanujo. **2** Urbo en la norda parto de Venezuelo. **3** Regiono de Hispanujo, kies ĉefurbo estas Valencio *1*. Internacia landerokodaĵo: ES-V.

**valon/o 1** Ano de la ĉefgento de Valonujo, parolanta precipe la francan, dum malplimulto parolas apartan gaŭlolatinidan lingvon (internacia lingvokodaĵo: wln). **2** Ano de Valonujo. **Valon/uj/o.** Regiono de Belgujo; ties suda, franclingva parto. Internacia landerokodaĵo: BE-WAL. **valon/a.** Rilata al valonoj, la valona lingvo aŭ Valonujo.

**vandal/o 1** Ano de ĝermana tribaro, kiu en la 5-a jarcento rabis en Gaŭlujo, Hispanujo, norda Afriko kaj la Roma Imperio. **2** (figurasence) Persono, kiu intence aŭ senkomprene detruas aŭ difektas valoraĵojn. **vandal/ism/o.** Ago de vandalo *2*.

**Vankuver/o.** Havenurbo ĉe la okcidenta marbordo de Kanado.

**Vanuatu/o.** Insulara lando en la orienta parto de Melanezio, inter Salomonoj kaj Fiĝio. Internacia landokodaĵo: VU.

**Varn/o 1** Marborda urbo en Bulgarujo. **2** Provinco de Bulgarujo, en ties orienta parto, kies ĉefurbo estas Varno *1*. Internacia landerokodaĵo: BG-03.

**Vatikan/o 1** Monteto ekster la antikva limo de Romo. **2** Lando sur Vatikano *1*, kies suvereno estas la papo. Internacia landokodaĵo: VA. **3** La ĉefurbo de Vatikano *2*.

**Veneci/o.** Urbo en norda Italujo, ĉe Adriatiko, nord-oriente de Bolonjo. **veneci/an/o.** Ano de Venecio. **veneci/a**. Rilata al venecianoj, Venecio aŭ al la vario de la itala lingvo parolata en la nordorienta parto de Italujo (internacia lingvokodaĵo: vec).

**Vien/o 1** La ĉefurbo de Aŭstrujo. **2** Aŭstra federacia lando, en kiu situas Vieno *1*. Internacia landerokodaĵo: AT-9.

**viking/o 1** Ano de skandinava grupo de maristoj, kiuj ekde la 8-a ĝis la 11-a jarcento vaste vojaĝis tra plejparte eŭropaj regionoj, kie ili rabis, komercis kaj ekloĝis. **2** Ano de unu el la historiaj popoloj, el kiuj originas vikingoj *1*. **viking/a.** Rilata al vikingoj: *vikinga ŝipo*.

**Vincent/o.** Vira nomo, i.a. de pluraj sanktuloj. **Sankt/a Vincent/o.** Insulo en Malgrandaj Antiloj, okcidente de Barbado. **Sankt/a Vincent/o kaj Grenadin/o/j.** Insulara lando en Malgrandaj Antiloj, kies ĉefa insulo estas Sankta Vincento. Internacia landokodaĵo: VC.

**vjetnam/o 1** Ano de la ĉefgento de Vjetnamujo, parolanta sudazian lingvon (internacia lingvokodaĵo: vie). **2** Ano de Vjetnamujo. **Vjetnam/uj/o.** Lando en suda kaj orienta Hindoĉinujo. Internacia landokodaĵo: VN. **vjetnam/a.** Rilata al vjetnamoj, la vjetnama lingvo aŭ Vjetnamujo.

**Vogez/o/j 1** Montaro en orienta Francujo, paralela al la Nigra Arbaro trans Rejno. **2** Departemento en orienta Francujo, el kiu granda parto estas okupata de Vogezoj *1*. Internacia landerokodaĵo: FR-88.

**Volg/o.** Rivero en okcidenta Rusujo, la plej longa en Eŭropo, kiu fluas tra meza Rusujo ĝis suda Rusujo, kie ĝi enfluas Kaspion.

**Zagreb/o 1** La ĉefurbo de Kroatujo. **2** Provinco de Kroatujo, en ties norda parto, kiu entenas Zagrebon *1*. Internacia landerokodaĵo: HR-01.

**Zambi/o.** Lando en suda Afriko, oriente de Angolo. Internacia landokodaĵo: ZM.

**Zanzibar/o 1** Insularo de Tanzanio, en la Hinda Oceano, ĉirkaŭ 35 kilometrojn oriente de la ĉeftero. **2** La plej granda urbo sur Zanzibaro *1*, ĉe la okcidenta bordo de ties plej granda insulo.

**Zeland/o.** Provinco en sudokcidenta Nederlando, inter Sud-Holando kaj Belgujo. Internacia landerokodaĵo: NL-ZE. **Nov-Zeland/o.** Lando en Oceanio, sudoriente de Aŭstralio. Internacia landokodaĵo: NZ.

**Zeŭs/o.** Laŭ la antikva greka mitologio, la reĝo de dioj kaj homoj, kiu vivas sur Olimpo.

**Zimbabv/o.** Lando en sudorienta Afriko, inter Bocvano kaj Mozambiko. Internacia landokodaĵo: ZW.

**Zurik/o 1** Urbo en la norda parto de Svislando. **2** Kantono de Svislando, kies ĉefurbo estas Zuriko *1*. Internacia landerokodaĵo: CH-ZH.